

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

POR VIVO KAJ
ESTONTO

DE LA HOMARO

•
POPOLA HEROAJO

•
LA SCIENC-PRAKTIKA
KONFERENCO EN
STARA ZAGORA

•
POEZIO DE
HRISTO GOROV

•
TAGOJ DE ESPERANTA
KULTURO — SOFIO'83

•
NIA KARA TRAJANA

•
ISEU EN
V. TÂRNOVO —
SUKCESA KOMENCO

•
HEROA PASINTECO

•
ENLANDA MOVADO

•
NI REGENZAS

septembro
1923



POR VIVO KAJ ESTONTO DE LA HOMARO



De la 21-a ĝis la 26-a de junio 1983 Prago, la ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio, altiris la atenton de milionoj da homoj el la tuta mondo: en ĝi okazis evento de grandega signifo por la estonto de la homaro — la Monda Asembleo „Por paco kaj vivo, kontraŭ la nuklea milito“. Ĝian laboron partoprenis 3625 senditoj el 132 landoj, reprezentantaj pli ol 108 internaciajn neregistarajn organizaĵojn, 1843 landajn organizaĵojn kaj dekojn da porpacaj kaj kontraŭmilitaj movadoj, inter kiuj ankaŭ la Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

Ĉiuj partoprenantoj en la Asembleo alvenis en Pragon, inspirite de sincera strebo doni sian kontribuon por konservo de la paco, trovi komunan lingvon en la batalo por evito de la nuklea milito, unuigi siajn fortojn por komunaj agoj kontraŭ la danĝera minaco de la vivo kaj la homa civilizo.

En la Palaco de Kulturo en Prago en daŭro de ses tagoj okazis nekonata ĝis nun laŭ siaj amplekso kaj celkonscio dialogo pri konservo de la paco kaj pri prevento de la nuklea milito. La delegitoj havis la eblecon diskuti libere pri tiuj problemoj en 22 grupoj — 11 por dialogo kaj 11 por diskutoj laŭ interesoj. Pli ol 1900 personoj esprimis sian opinion pri ili. Estis esprimitaj opinioj malsamaj el politika, religia kaj filozofia vidpunkto, sed finfine ĉiuj delegitoj estis unuanimaj rilate la plej gravajn demandojn pri la estonto de la planedo, pri konservo de la paco kaj ĉesigo de la vetarmado. Estis kategorie kondamnitaj la nuklearmila vetarmado, provokita de la agresemaj imperiistaj rondoj kaj de la aventura politiko de Reagan kaj ties aliancanoj en NATO, kaj ankaŭ la decido pri instalo de novaj usonaj raketoj en Okcidenta Eŭropo,

kio pligrandigas la danĝeron pri nuklea katastrofo. Samtempe estis esprimita la konvinko, ke la vojo por evito de la katastrofo estas montrita en la proponoj de Sovetunio kaj de la ceteraj landoj de la socialisma komunajo: pri malarmado, pri subskribo de kontrakto pri reciproka ne-uzo de militforto en la internaciaj rilatoj kaj pri kreo de larĝa kaj aktiva fronto de ĉiuj pacamaj fortoj.

La partoprenintoj en la Asembleo akceptis finan dokumenton „Alvoko por paco kaj vivo, kontraŭ la nuklea milito“. Tiu ĉi alvoko, kiun oni povas nomi voĉo de la racio, estas pasia apelacio al la homaro, al agoj por ĉesigo de la febra vetarmado, por fiaskigo de la decido pri instalo en Okcidenta Eŭropo de la novaj nukleaj raketoj „Pershing-2“ kaj „Cruise“. Samtempe en la Alvoko estas esprimita la optimisma perspektivo por daŭra, justa kaj demokratia paco kaj la konvinko, ke la milito ne estas neevitebla.

Al la Asembleo estis adresitaj pli ol 250 mil leteroj kaj salutmesaĝoj el la tuta mondo. Inter ili estas ankaŭ la salutleteroj, voĉdonitaj de la partoprenintoj en la Tagoj de la E-Kulturo en Sofio, kaj en la Pacrenkontigo de esperantistoj el Sudokcidenta Bulgario en Samokov, okazintaj en la antaŭvespero de la Asembleo. En ili la bulgaraj esperantistoj deklaris sian subtenon al la Asembleo kaj sian pretecon kontribui por popularigo kaj efektivigo de ties decidoj. En centoj da kunvenoj kaj mitingoj subtene al la Asembleo la bulgara popolo esprimis sian apogon al ĝi. La bulgara delegitaro, kiu plej aktive kaj rezultodone partoprenis la laboron de la Asembleo, donis sian kontribuon por ĝia sukcesplena laboro. Ĝiaj membroj kompetente kaj konvinke prezentis la pacaman politikon de nia socialisma ŝtato, esprimis la volon de la bulgara popolo vivi kaj labori en paco.

La Monda Asembleo „Por paco kaj vivo, kontraŭ la nuklea milito“ finiĝis. Nun antaŭstaras obstina laboro por popularigo kaj efektivigo de ĝiaj ideoj kaj decidoj. En tiu ĉi laboro aktive partoprenas ankaŭ la bulgaraj esperantistoj, kiuj ĉiam pli efike utiligas Esperanton por realigi la noblajn decidojn de la Asembleo.

Vivu la paco kaj la amikeco inter la popoloj!

DIMITAR HAĜIEV,
prezidanto de la Bulgara MEM-komitato



POPOLA HEROAĴO

NANO KJUČUKOV — unua vicprezidanto de BEA

Ciuj laboruloj en Popola Respubliko Bulgario ĉi-aŭtune laŭ plej solena maniero celebros la 60-jaran datrevenon de la glora Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo. La memoro pri la ribelo estos eterne viva en la popola konscio.



Raportas Nano Kjučukov — vicprezidanto de BEA

Sendube, tiu ĉi ribelo estas la plej granda, la plej heroa evento en nia politika historio ekde la liberigo el sub otomana jugo ĝis la Dua Mondmilito. Ĝi estas unu el la plej majestaj kaj edifaj eventoj dum la miltricentjara heroa historio de la bulgara popolo. Kaj ju pli da jaroj pasas depost tiu ĉi revolucia epopeo, des pli forte brilas ĝia majesteco.

Estas tiel, ĉar unuafoje en la historio de Bulgario la laborista klaso, la laborkampanoj kaj la popola intelektularo sub la standardo de la

Unueca Fronto kaj sub la gvido de la Komunista Partio batalis por renverso de la burĝa regpotenco kaj por fonda de laborista-kampana registaro:

— ĉar unuafoje en la historio de Bulgario en la fajro de l'batalo estis kreita kunagado inter komunistoj kaj agrarpartianoj, batalunuigo de laboristoj kaj kampanoj, dank' al kiu du jardekojn pli malfrue venkis la socialisma revolucio en nia lando;

— ĉar unuafoje ne nur en la historio de Bulgario, sed ankaŭ en la tuta mondo laboristoj kaj kampanoj organizite levigis kontraŭ la faŝismo, kiu tiutempe estis aperanta sur la historia scenejo kun sia malbonaŭgura ideologio.

La Septembra Popola Kontraŭfaŝisma Ribelo skuis la regantan en nia lando monarko-faŝisman diktaturon kaj ludis decidan rolon dum la pluaj bataloj de la Bulgara Komunista Partio kaj de la popolo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo.

La eksplodo de la ribelo estas sekvo de la kompleta evoluo de nia lando post la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, de la revolucia krizo, kaŭzita de la Unua Mondmilito. La ribelo estas rezulto de la potenca revolucia impeto, de la kreskanta rolo de la laborista klaso kaj la popolamasoj en la nova epoko, kiam aktualigis la tasko radikale ŝanĝi la kapitalisman sistemon kaj krei novan sociopolitikan ordon.

La 9-an de junio ĉi-jare Bulgario rememoris la sangan milit-faŝistan puĉon de antaŭ sesdek jaroj, kiam perforte estis renversita la leĝa registaro de la Bulgara Agrarana Popola Unuigo kaj kelkajn tagojn poste estis kruele mortigita ĝia gvidanto mem — la granda demokrato-respublikisto Aleksandăr Stambolijski. Tiam la puĉo provokis spontanegan reziston de miloj da laborhomoj — laboristoj kaj kampanoj, kiuj levigis kun armilo en la manoj defende al la demokratiaj akiraĵoj. Plej grandan impeton kaj forton la ribelo havis en Norda Bulgario, en la distriktoj Pleven kaj Sumen. Kelkaj urboj kaj

multaj vilaĝoj estis dum kelkaj tagoj en la manoj de la popolo. La junia ribelo estis frakasita, ĉar ĝi ne estis bone organizita. Sed ĝi postlasis multajn ekzemplojn de heroeco kaj sinofero, donis plej gravan politikan lecionon — la lecionon pri neceso de unueco inter laboristoj kaj kamparanoj, de firma komuna batalo de komunistoj kaj kamparanoj kontraŭ la komuna malamiko — la milit-faŝistaj puĉistoj.

„La puĉo je la 9-a de junio kaŭzis krizon rilate la problemon pri la potenco, la eliro el kiu krizo ne povis esti alia krom perarmila ribelo por laborista-kamparana registaro“ — estis dirite en la rezolucio, akceptita de la historia kunsido de CK de BKP, okazinta la 5-an kaj 6-an de aŭgusto 1923.

Tiun saman spiriton havas ankaŭ la rimarkindaj artikoloj de Georgi Dimitrov pri la Unueca Fronto, aperintaj en aŭgusto kaj septembro en „Laborista Jurnal“, en kiuj li ĉiuflanke traktas la problemojn pri unueco kaj vasta kunlaboro de la demokratiaj fortoj. Tiuj ideoj eltenis la jugon de la historio kaj eniris la oran fonduson de l'taktiko de la laborista kaj kontraŭfaŝisma movado.

Unuafoje tiuj ĉi ideoj estis pruvitaj nur kelkajn monatojn post la sangoverŝa junia prelude — kiam eksplodis la Septembra popola ribelo. Al batalo kontraŭ la faŝista malamiko levigis la laboruloj en multaj regionoj de Bulgario. Ĉie, kie la Komunista Partio alvokis la laboristojn kaj kamparanojn al batalo kontraŭ la faŝismo, ili ribelis, sekvante la ekzemplon de siaj rusaj fratoj. Plej frue la ribelo komenciĝis en la distrikto de Stara Zagora. Ĝia unua fajrujo estis la heroo vilaĝo Măglij. Kun granda impeto la ribelo eksplodis ankaŭ en Stara Zagora, en Nova Zagora kaj Girpan. . . En multaj vilaĝoj fondiĝis laborista-kamparana regpotenco.

Nia popolo neniam forgesos la revolucionan impeton en Nordokcidenta Bulgario, sur kies teritorio la ribelo estis plej amasa kaj longdaŭra. Legendojn oni rakontis kaj rakontos pri la eksterordinara braveco de la ribelintoj en la regionoj de Miĥajlovgrad, Vraca, Berkovica, Lom, Bjala Slatina, Orjaĥovo, pri la sangoverŝaj bataloj apud fervojstacioj Bojĉinovci kaj Brusarci.

La popolo neniam forgesos ankaŭ la batalojn apud fervojstacio Saranci, apud Bracigovo, en la regionoj de Ihtiman kaj Razlog, en la distriktoj Pazarĝik kaj Burgas kaj en multaj aliaj lokoj en la tuta lando.

Viva kaj eterna estos la memoro pri la gloraj kaj bravaj gvidantoj de la Septembra Ribelo Georgi Dimitrov kaj Vasil Kolarov, pri la bravaj ribelkomandantoj Gavril Genov kaj la fratoj

Aristo kaj Ivan Miĥajlov, pri Georgi Damjanov, Zamfir Popov, Petko Enev, Cujatko Radojnov, Vladimir Poptomov, Ferdinand Kozovski, Georgi Miĥajlov, Penĉo Dvorjanov, Jordan Ciporkov, Jordan Kiskinov, la legenda popo Andrej. . .

La ribelo ne sukcesis — malgraŭ la alta revolucia spirito, malgraŭ la abnegacia batalo de laboristoj kaj kamparanoj. La bestigitaj faŝistaj hordoj kaj la cara armeo kun monstra krueleco komencis ekstermi la ribelintajn laboristojn, kamparanojn, metiistojn, intelektulojn — antiŝaŝistojn kaj demokratojn. Laŭ deklaro de la faŝista registaro mem, ĉefrunte kun la sanga profesoro Cankov, kvin mil bulgaraj laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj fariĝis viktimoj de la furioza faŝista teroro.

La arestitaj ribelintoj kondutis kuraĝe kaj firme antaŭ la faŝistaj tribunaloj. Eĉ la malamikoj estis devigataj mutigi antaŭ la heroeco de la batalantoj dum la ribelo. Kaj la komunistaj partioj en alilando esprimis la entuziasmon de la tutmonda proletaro pro la heroaĵo de la bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj. Pri la heroeco de la bulgara popolo skribis la sovetaj ĵurnaloj „Pravda“ kaj „Izvestija“, la franca l'Humanité“, la germana „Rote Fahne“, la ĉeĥoslovaka „Rude Pravo“, la jugoslavia „Radnik“, la rumana „Socialismul“ k.a.

Sed la ribelo ne estis afero nur de komunistoj kaj agrarpartianoj. Ĝin amase partoprenis la urbaj kaj vilaĝaj laboramasoj, apartenantaj al neniu partio, kiuj bone komprenis, ke ili batalas por sia vivo kaj por sia hela estonteco.

Inter la partoprenantoj en la ribelo estis ankaŭ bulgaraj esperantistoj. Estas konate, ke la registaro de Aleksandăr Stambolijski per lego enkondukis fakultativan instruadon de Esperanto en la realajn gimnaziojn, en la ŝtatajn kaj privatajn komercernejojn k. a. Oni komencis organizi Esperanto-kursojn en multaj oficejoj, eldoni esperantlingve verkojn de klasikuloj de la bulgara literaturo, okazigi eksterlande Esperanto-prelegojn pri Bulgario. Estis fondita komunista E-organizaĵo (BuLEA). La bulgaraj esperantistoj kun kontenteco kaj entuziasmo renkontis tiujn favorajn kondiĉojn por Esperanto-agado. Ilia negativa rilato al la faŝista registaro de Cankov, esprimita en gazeto „Bulgara Esperantisto“, plej elokvente parolas pri la decida subteno de la tuta bulgara Esperanto-movado al la registaro de Stambolijski. Siaflanke la reĝimo de la agrarpartia registaro havis pozitivan efikon por la demokratiĝo kaj maldekstrigo de la Esperantomovado. Plej decidan rolon por tiu proceso ludis la Septembra Ribelo. Rezulte de tiu maldekstrigo la bulgaraj esperantistoj, precipe dum la jaroj de la Dua Mondmilito, amase fariĝis parto de la bulgara revolucia antiŝaŝista movado. El la vicoj de la esperantistoj pli ol 150 batalantoj

pereis en la batalo kontraŭ la monarko-faŝismo.

Antifaŝisma kaj demokratia laŭ siaj celoj kaj karaktero, la Septembra Ribelo havis grandegan influon sur la pluan evoluon de la socia, politika kaj kultura vivo de Bulgario dum la sekvaj du jardekoj. „Oni povas aserti sen troigo, — skribas Georgi Dimitrov, — ke sen tiu influo kaj sen tiuj lecionoj, donitaj de la Septembra Ribelo en 1923, ne estus eblaj la fondiĝo de la potenca Patrolanda Fronto kaj la epokofaranta popola venko je la 9-a de septembro 1944.

Dum la tagoj de la ribelo formiĝis ribelulaj taĉmentoj, kiuj hardiĝis en la fajro de la batalo. Ili fariĝis unua modelo de la nuna Bulgara Popola Armeo, kiu ŝultro ĉe ŝultro kun la armeoj de la Varsovia Kontrakto defendas la akiraĵojn de la revolucio, gardostaras la pacon kaj la sekurecon sur la Balkana Duoninsulo, en Eŭropo kaj en la mondo.

La Septembra Ribelo havis grandegan efikon ankaŭ sur la pluan disvolvigon de la Bulgara Agrarana Popola Unuiĝo. La batalemaj fortoj de tiu ĉi partio eltiris la lecionon, ke sukcesan batalon kontraŭ la subpremantaj klasoj oni povas efektiviigi nur en firma unueco kun la laborista klaso kaj ĝia komunista avangardo. Hodiaŭ la komunista-agrarana frateco kaj unueco estas tre valora akiraĵo de la bulgaraj komunistoj kaj agrarpartianoj, firma apogo kaj garantio de la hodiaŭa kaj morgaŭa trankvilaj tagoj de nia socialisma patrolando.

La Septembra Ribelo traboris vojon al la hela epoko de socialismo en Bulgario — per sia historia ekzemplo, per la leninisma elkresko kaj hardiĝo de la Komunista Partio kiel revolucia avangardo de la laboruloj, per la antaŭenpuŝo, kiun ĝi donis por unuigo de ĉiuj demokratiaj kaj progresemaj fortoj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, per sia rolo por plialtigo de la revolucia konscio de la vastaj popolamasoj.


Reala, viva enkorpiĝo de la ideoj kaj faroj de la herooj en 1923 estas nuntempa socialisma Bulgario. La ruĝa standardo de la herooj-septembruloj flirtas alte super nia patrujo, kiu dum mallonga tempo transformiĝis en evoluintan industri-agraran landon, kun alta socialisma kulturo, kun granda internaca aŭtoritato.

Esti fidelaj al la ruĝa standardo de la herooj-septembruloj por la bulgaraj esperantistoj tio signifas esti kiel ili pretaj fordoni ĉion por defendo de la revoluciaj konkeroj, por la gloro kaj la majesteco de la patrolando — nedisigebla parto de la granda socialisma komuneco; tio por ili signifas batali kontraŭ la minaco de termonuklea katastrofo, labori kaj batali por konservo de la paco en la mondo, por demokratio kaj humanismo, por sociala progreso!


Gloron, eternan gloron al la herooj-septembruloj!

Gisteran kliniĝon antaŭ ilia senmorta herooŝo!

(Fragmentoj el la raporto antaŭ la Scienc-Praktika Konferenco „60 jaroj de la Septembra Ribelo en 1923)



SCIENC—PRAKTIKA KONFERENCO „60 JAROJ DE LA SEPTEMBRA RIBELO 1923“



Hristo Gorov, prezidanto de BEA, malfermas la Scienc-Praktikan Konferencon

La 11—12-an de junio j.k. en urbo Stara Zagora okazis la plej grava aranĝo de Bulgara Esperantista Asocio por la kuranta jaro — la Scienc-Praktika Konferenco „60 jaroj de la Septembra Ribelo 1923“.

La konferenco, kiel substrekis en sia malferma parolo la prezidanto de BEA **Hristo Gorov**, celis „modeste kontribui al la historio de la Septembra Ribelo, atentigi pri la revolucio de la bulgaraj esperantistoj“.

La konferencon honoris per sia ĉeesto k-do **K. Kolev**, reprezentanto de la Distrikta Estraro de BKP, kaj ankaŭ reprezentantoj de E-asocioj el la socialismaj landoj: **Ahim Meiner** el la Esperanto-asocio en Kulturligo de GDR, **Eva Farkas-Tátár** kaj **Ada Csizsar** el la Hungara E-Asocio, **Tadeusz Ejsmont** el la Pola

E-Asocio, la geaktoroj **Genadij Rudenko** kaj **Aleksandr Iovlev** el la Leningrada E-teatro (USSR) kaj **Natalija Nikiforova** — ĵurnalistino kaj administrantino de la Leningrada E-teatro.

Ĉeestis ankaŭ E-veteranoj — partoprenintoj en la Septembra Ribelo — **Rajno Ĉepilev** el Stara Zagora, **Ivan Draganov** el Sofio, **Radoslav Tričkov** el Vraca, **Ivan Dimčev** — **Hans** el Varna, **Anton Genov** el Nova Zagora.

K-do **Hristo Gorov**, prezidanto de BEA, malfermis la konferencon per mallonga parolado.

En la nomo de la Distrikta Estraro de BEA en Stara Zagora la ĉeestantojn salutis **Petko Bonev** — prezidanto de DE de BEA.

Post li la parolon havis k-do **Nano Kjučukov** — unua vicprezidanto de BEA. Li prezentis la bazan raporton de la konferenco, titolitan „La Septembra Ribelo en Bulgario 1923“ (ĝian tekston kun certaj mallongigoj legu sur la loko de la ĉefartikolo en nia numero — sur paĝo 1).

Sekvis salutparoloj de niaj alilandaj gastoj: **Aleksandr Iovlev** — en la nomo de la Societo de Leningradaj Esperantistoj, **Ahim Meinel** — en la nomo de E-Asocio en Kulturligo de GDR, **Eva Farkas-Tátár** — en la nomo de Hungara E-Asocio.

Post la salutparoloj la ĉeestantoj havis la maloftan plezuron aŭskulti vicon da tre bonaj referaĵoj kaj sciencaj sciigoj, kiuj prezentis la rilaton de BEA al la Septembra Ribelo kaj la partoprenon de dekoj da ĝiaj membroj en la ribelo.

La raporton de **J. Portnoj** (li mem ne ĉeestis) el Sovetunio: „**Pjotr B. Jarevskij** — soveta amiko de la bulgaraj batalantoj por libero“ legis **Kunčo Vălev**, ĝenerala sekretario de BEA.

Sekvis la raportoj de:

— **d-ro Tadeusz Ejsmont** el Pollando: „Ideaj-
edukaj edifoj de la Septembra Ribelo 1923
en Bulgario“;

— **Natalija Tiškova** el Miĥajlovgrad: „La
Septembra Ribelo en la distrikto de Miĥajlov-
grad“;

— **Ivanka Kostova**, kunlaborantino en la
Distrikta Muzeo de Stara Zagora: „La Sep-
tembra Ribelo en la distrikto de Stara Zagora
(la raporto estis interpretita en Esperanton);

Krăstju Karucin: „Esperantistoj-partoprenin-
toj en la Septembra Ribelo“;

— **Hristo Gorov**: „La poemo „Septembro“
en Esperanto“;

— **Canko Murgin**: „Belliteraturo pri la Sep-
tembra Ribelo en Esperanto“;

— **Bojana Prodanova** el **Gabrovo**: „La Sep-
tembra Ribelo 1923 en la Esperanta Gazetaro“;

— **Ljubomir Gipov**, ĉefo de Direkcio „Kul-
tura kaj historia heredaĵo“ ĉe la Distrikta Mu-
zeo en Pleven: „Batalema E-gento“ (pri du
E-generacioj el la familio Gaŝevski);

— **Ivan Keremidĉiev**: „La Septembra Popo-
la Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923 — edifoj
kaj signifo por la venko de la socialisma revo-
lucio kaj la prospero de la E-movado en Bul-
gario“;

— **Rajno Ĉepilev** el Stara Zagora: „Mia par-
topreno en la Septembra Ribelo 1923“ (re-
memoroj);

La Scienc-Praktika Konferenco „60 jaroj
de la Septembra Ribelo 1923“ estis fermita per
konkluda parolado de la prezidanto de BEA
Hristo Gorov, kiu substrekis, ke „el la aŭditaj
referaĵoj klare vidiĝis, ke BEA senrezerve
staris ĉe la flanko de la Septembra Ribelo“,
kaj dankis al ĉiuj raportintoj pro ilia kontri-
buo al la laboro de la konferenco.

La saman vesperon okazis koncerto de E-ar-
tistoj, dediĉita al la 60-a datreveno de la Sep-
tembra Ribelo.

Tre fortan impreson faris la sinprezento de
la **Lernejana Folkloro Grupo** ĉe legosocieto
„I. Kirĉev“ en Jambol. La infanoj, vestitaj
en belaj popolkostumoj, estis malavare aplau-
ditaj de la publiko. Gratulojn al **Georgi Blago-
ev** — gvidanto de la danctrupa, kaj al la
ĥorestrino **D. Părvanova**! Ne estus superflue
mencii, ke la tekstoj de la plenumitaj kantoj
estis tradukitaj en Esperanto.

Hristo Mavrov, aktoro el la teatro en Jam-
bol, recitis la Paroladon de **Petko Enev** antaŭ
la ŝaŝista tribunalo en urbo Nova Zagora en
1924.

Rene Jordanova, operkantistino el la Oper-
teatro en Stara Zagora (soprano), laŭreatino
de Dimitrov-premio, plenumis la bulgaran po-
polkanton, „Florprintempo“ kaj arion el la
opero „Nimfo“ de **Dvořák** (Dvorjak). Ĉe la
piano estis **Savina Kulova**.



Partoprenintoj en la Scienc-Praktika Konferenco en Stara Zagora

Foto: Lada Milkova

Dinjo Dinev, tenoro el la Operteatro en Plovdiv, plenumis „Adiaŭe“, muziko de Georgi Zlatev-Cerkin, „Forigito“, muziko de M. Todorov kaj la rusan popolkanton „Belaja ĉerjomuĥa“.

Dobrinka Todorova el Miĥajlovgrad plenumis tri popolkantojn. Si posedas aparte belan malaltan voĉon, kiu tre plaĉis al la publiko.

Fine la aktoroj el la Leningrada E-teatro G. Rudenko kaj A. Iovlev plenumis por la ĉeestantoj fragmentojn el „Ruĝo kaj Bruno“ de Ivan Radoev.

La sekvan tagon, 12-an de junio, la partoprenintoj en la konferenco per specialaj aŭtobusoj vizitis la memorindajn lokojn en vilaĝo Maglij, la muzeon „Cvjatko Radojnov“ en vilaĝo Krân, trarigardis la domon-muzeon de Ĉudomir en Kazanlâk.

Per tiu ekskurso al la lokoj, ligitaj kun la eksplodo de la Septembra Ribelo, finiĝis la Scienc-Praktika Konferenco de BEA, dediĉita al ĝia 60-a datreveno.

L. RAEVA

Impresoj de niaj gastoj




Ni havis la honoron partopreni la Scienc-Praktikan Konferencon en Stara Zagora okaze de la 60-jara jubileo de la unua en la mondo kontraŭfaŝisma ribelo en septembro 1923 kaj transdoni al niaj bulgaraj amikoj la salutojn de la hungaraj esperantistoj.

La bela urbo Stara Zagora, odoranta je florantaj tilioj, forte impresis nin. La referaĵoj profunde nin emociis, reviviginte antaŭ ni la heroojn de la ribeluloj en 1923. Ni trovis kortuŝaj la plenumojn de la infana ensemblo por kantoj kaj dancoj dum la solena koncerto. Ĉi-tiuj infanoj jam de sia naskiĝo ĝuas la favorajn kondiĉojn, kiujn via socialisma ŝtato garantias al ili. Ni trovas tre inda la kutimon, ke ili de tempo al tempo haltu, ĉesigu la lernadon aŭ la diligentan laboron kaj kliniĝu antaŭ la memoro de viaj herooj antaŭuloj.

Kune kun la aliaj eksterlandaj gastoj kaj kun la konferencanoj, ni por unua fojo vizitis la memorlokojn en Măglij, en Krân kaj en Kazanlâk. Ni ĝuis ankaŭ la belecon de la Balkan-montaro — scenejo de sangaj, herooj bataloj, kaŝejo de bravaj hajdutoj kaj partizanoj-kontraŭfaŝistoj, simbolo de la nevenkebla liberamo de la bulgara popolo. Nin profunde impresis ankaŭ la impona memorloko Buzluĝa — simila al krono sur la montosupro.

Ni deziras al vi prosperan estontecon sur ĉi tiu tero, kiun sanktigis tiom da sango kaj sinofero de viaj grandaj patriotoj.

EVA FARKAS-TATÁR,
Hungario



Estas por mi samtempe granda honoro kaj ĝojo partopreni la solenan Scienc-Praktikan Konferencon memore al la 60-jariĝo de la heroo Septembra Ribelo de la bulgara popolo. Okaze de tiu ĉi signifoplena jubileo mi tre kore salutas vian E-asocieton en la nomo de nia E-asocio en Kulturligo de GDR.

Mi ne parolas kiel profesia historiisto, sed kiel simpla amiko de via bela lando Bulgario.

Via popolo povas esti tre fiera pro la fakto, ke ĝi plej frue montris la faŝistan danĝeron por tuta Eŭropo kaj por la mondo.

Unu el tiuj, kiuj antaŭvidis la germanan faŝistan danĝeron kaj mem estigis unu el la plej fruaj viktimoj de la faŝismo estis Geo Milev — „kuraĝa batalanto, honesta civitano kaj talenta poeto“, kiel mi trafe legis pri li en la antaŭparolo de lia poemo „Septembro“.

En 1933 en nia lando venkis la faŝismo. Sed lige kun tiu terura dato en nia historio mi rememoras ankaŭ la kuraĝan agadon de la granda bulgaro Georgi Dimitrov, kiu estigis de akuzato antaŭ la faŝista Reichsgericht al akuzanto de la faŝista potenco, kiu pruvis, ke la faŝistoj mem bruligis la germanan parlamenton Reichstag. Tio estis granda venko ne nur de via popolo, sed ankaŭ de nia popolo kaj de la tuta progresema homaro.

Ankaŭ per la laborista E-movado en ambaŭ landoj oni povus pruvi la kunagadon de l'progresemaj fortoj de la bulgara kaj germana popoloj. Detale priskribis tiujn ĉi rilatojn la sekretario de nia asocio, d-ro Blarke, en la gazeto „Der Esperantist“.


Ĝojige estas konstati la humanajn amikajn multflankajn rilatojn de niaj frataj popoloj, kiuj en ĉiuj sferoj kunlaboras, kaj per tio la ideo pri popola amikeco kaj libero de Geo Milev, Ernst Thaelmann kaj Georgi Dimitrov realiĝas.

A. MEINEL,
GDR



Nin forte impresis la Internacia Konferenco, dediĉita al la 60-a datreveno de la Septembra Ribelo 1923. La partoprenintoj en ĝi venis en Stara Zagora el tuta Bulgario, el Hungario, Pollando, GDR, Sovetunio. Kaj ni denove havis la eblecon konvinkiĝi kiel la bulgaroj adoras sian gloran pasintecon, konservas la tradiciojn de estimo al la memoro de la herooj-batalantoj por liberigo el la jugo kaj subpremado. En la granda koncerto, en kies programo partoprenis multaj talentuloj, la Leningrada E-teatro sin prezentis per fragmento el la teatraĵo „Ruĝo kaj Bruno“ de Ivan Radoev.

GENADIJ RUDENKO,
ALEKSANDR IOVLEV,
Sovetunio



En Pollando iuj el miaj amikoj nomas min ŝerce „bulgaro“ — ŝajne pro miaj multaj vizitoj kaj konoj de Bulgario kaj pro miaj multaj kaj sinceraj bulgaraj amikoj-esperantistoj. Mi ĉiam kun granda plezuro vizitas vian ĉarmantan landon kaj ĉiam konstatas, ke ĝi pli kaj pli evoluas kiel moderna disvolviginta socialisma lando, efektiviganta la testamentojn de la herooj, pereintaj en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo.

Por mi estis vera honoro la invito partopreni en la Scienc-Praktika Konferenco okaze de la 60-jara jubileo de la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923. Por prepari mian raporton, mi devis trastudi multajn dokumentojn, kio multe pliriĉigis miajn konojn pri via historio kaj speciale pri la klasaj bataloj de la bulgaraj laboristoj kaj malriĉaj vilaĝanoj.

Mi estas ĝoja renkonti denove malnovajn bulgarajn geamikojn kaj konatigiti kun novaj E-aktivuloj ĉi tie — en Stara Zagora. Kun granda intereso kaj estimo mi vizitis la historiajn lokojn en Stara Zagora, Kazanlâk, Krân. Ege interesa kaj informriĉa estis la interparolo kun la urbestro de Stara Zagora, dum kiu ni multe eksciis pri la disvolviĝo de la distrikto. Oni povas multon ellerni el via sperto en la socialisma konstruado kaj esperantista agado en via lando.

Min forte impresis la plenumoj de la etuloj-esperantistoj en la koncerto kaj eble polaj geesperantistoj ankaŭ havos la plezuron ĝui ilian arton dum sia nacia E-kongreso ĉi-aŭtune?

Korajn dankojn pro viaj gastamo kaj ĝentileco dum mia restado en Bulgario.

D-ro TADEUSZ EJSMONT,
Pollando

Veterano rakontas

GEPATROJ KAJ INFANOJ — KUNE EN LA Batalo...

Gvidata de spertaj kaj bravaj komunistoj, la pliparto el kiuj pereis dum la Septembra Ribelo, la partio en urbo Lom estis tre forta. Ĝia influo estis grandega, pro kio dum kelkaj jaroj laŭvice la laboruloj el la urbo konfidis la komunumon al la komunistoj. La dua „komuno“ estis likvidita de la naŭajuniaj puĉistoj.

La partian klubon („Splendid“) vizitis ne nur komunistoj kaj komsomolanoj, sed ankaŭ ni — infanoj. La Komsomolo havis siajn organizajn kaj amasajn formojn de laboro. Krom la plenumendaj organizaj taskoj, la komsomolanoj partoprenis gimnastikajn grupojn, aliaj kantadis en la partia ĥoro, triaj ludis en la futbalteamo „S. Budjonniĵ“. Kaj ni, infanoj, ludis en sportgrupoj, deklamis en partiaj kunvenoj, partoprenis en amuzaĵoj kaj ekskursoj.

Unuafoje en la partian klubon min enkondukis mia onklo Georgi Avramov — ferlaboristo, junulara kaj sindikata aktivulo kaj membro de la partio. Poste ĉi tien kunprenis min mia onklino Stojanka, la akuŝistino, kiu altiris al la infanaj manifestiĝoj ankaŭ mian fratinon Viza. Oni kudris al mi ruĝan ĉemizon, kiel al la ceteraj junuloj. Dum la unuamaj manifestacio, kune kun Viza kaj multaj aliaj geknaboj kaj gejunuloj, ni marŝis en la unuaj vicoj. Ni svingadis ruĝajn flagetojn, kantadis kune kun la plenkreskuloj laboristajn marŝojn, ĥore proklamis sloganojn omaĝe al la Unua de Majo, al la partio kaj la laboro. Aparte gaje kaj agrable por ni pasis la partiamuzvesperoj kaj subĉielaj amuzfestoj. Oni uzis nin kiel kurierojn — ni disportadis leterojn kaj buŝajn invitojn al partiaj kunvenoj.

Kiam okazis kunveno aŭ mitingo, ĉiam ankaŭ mi ĉestis. Por mi tio estis tre facila laboro: mi estis lernanto en la antaŭgimnazio. Aŭdinte, ke io ie okazas, ni tuj ekkuregis tien.

Okazis la faŝista puĉo je la 9-a de junio 1923. Ni, la etuloj, plej multe ektimis. Soldatoj kaj policanoj krozadis tra la stratoj. Unu-du monatojn post la puĉo la plenaĝuloj ekparolis pri preparo de ribelo. Do, ni eksciis, ke prepariĝas revolucio. Sur la stratoj la partiaj kamaradoj malkaŝe salutadis unu la alian per „Estu pret!“ kaj „Mia pret!“ Mia onklo kaj mi kune pretiĝis nin por la renverso de la burĝaro kaj ekspluatantoj.

Ekestis la glora tago 23-a de septembro. Bedaŭrinde, al ni, la plej junaj, oni tiam nenion diris kaj neniajn taskojn donis. Sed mia onklo jam foriris al Vâlcedrâm kiel teknika helpanto de Georgi Manolov. Tie ili ekribeligi la popolamasojn kaj matene jam batalis apud la dratretoj de la kazerno. Poste li estis sendita kiel kuriero en la okcidentan sektoron apud la malnova tombejo, situanta kontraŭ nia domo. Tamen tie soldata grupo kaptis lin. Li evitis la mortpafon pro manko de pruvoj, krome, li ne estis gvidpersono en la urbo.

La maldekstra, okcidenta fronto de la ribeluloj, duoncirkle ĉirkaŭbaranta la kazernon, distancis dekon da metroj de nia domo. El la kazerno fajfis kugloserioj tra nia korto kaj preter niaj dometoj. Ĉirkaŭ tagmezo ni eksciis pri la aresto de mia onklo Georgi Avramov. Mia avino estis tre maltrankviligita pro li, ŝia filo.

Avinjo diris al mi: „Portu supren la argilkruĉon kaj ĉi tiun panon. Eble estos por funebra manĝo omaĝe al...“, sed ŝi ne finparolis. Pro ŝia sopirĝemo mi konjektis, ke temas pri onklo. Kaj tra la malantaŭa parto de la barilo mi direktiĝis al la tombejo. La ribelantoj havis panon, nur la akvon haste forglutis.

La sekvan tagon mi denove iris ĉe ilin. Oni sendis min aĉeti panon kaj alporti akvon. Antaŭ tio mi estis irinta al la segilejoj, al la paŝtejoj kaj laŭ alia strato revenis kaj sciigis al la ribelantoj, ke armitaj personoj preterkuras kun soldata grupo. Duan fojon mi alportis al la batalantoj plantpanetojn kaj akvon. Tio estis mia lasta iro. Posttagmeze preter nia korto rajde pasis soldata eskadrono, gvidata de malbonhumora ĉefserĝento. La soldatoj ekrapidis al la tombejo. Ekkrakis mitraloj, ekpafis fusiloj.

Post ĉi tiu tago venis la malvenko. Ektondris ankaŭ la kanonoj de la soldatoj el Vidin, venintaj helpi la regimenton de Lom. Obuso ekfajfis kaj eksplodis proksime de la kelo, kie ni trovis azilon. Unu el miaj fratinetoj ekploris. La pafado malproksimiĝis de la kvartalo.

Avinjo, kuraĝigate de panjo, ĉe la silenta konsento de paĉjo, komisiis al mi iri al la kazerno por vidi, kio okazis kun onklo. La kazerna korto estis konata al mi. Sude de la ĉevalejoj iam okazadis piedpilkaj ludoj. Por ke ni spektu ilin senpage, ni, infanoj, estis farintaj truojn en la barilo, tra kiuj ni eniris. Tra unu el tiuj truoj mi traŝoviĝis en la kazernan korton kun pakajeto da nutraĵo kaj cigaredoj. La gardostarantoj ne turnis al mi atenton kaj mi enŝteliĝis en la unuan ĉevalejon. Tie mi trovis kelkajn personojn el Lom. Ili klarigis al mi, kie mi povos trovi mian onklon. Kune kun li estis ankaŭ kelkaj aliaj viroj el nia kvartalo. Ili ekahis pro surprizo kaj ĝojo. Ili ĵetis sin al mi por ĉirkaŭpreni kaj karesi min. Mi rapide rakontis al ili kio okazas en la urbo.

— Kamaradoj, — ekparolis onklo, — ni eble pereos, tamen ĉi tiu infano kaj la ceteraj kiel li daŭrigos la batalon ĝis plena venko. Emociite, ili mallaŭte ekkantis:

Standardo nia ruĝa nun
libere flirtu sub la sun'...

Ankaŭ mi ekkantis. Kiam ili sciigis al mi, ke oni mortigis la akuŝistinn Stojanka kaj ŝian edzon, mi ekploris pro la morto de miaj parencoj. Onklo brakumis min kaj komencis trankviligi min: „Viktimoj estas necesaj, ne-veto mia! Eble venos ankaŭ nia vico. Tamen vi devas scii tion kaj poste rakonti...“

Laŭ la sama vojo mi elŝoviĝis el la kazerno. La sekvan tagon, kun granda pakajo, en kiu estis cigaredoj kaj nutraĵo, mi pene traŝoviĝis tra la dratreto kaj iris ĉe la malliberigitajn. Mi transdonis al ili leteron, per kiu oni informis ilin pri la eventoj en la urbo. Tiel preskaŭ ĉiutage kun nutraĵo kaj cigaredoj mi vizitadis la kaptitajn septembrulojn, iuj el kiuj ne revenis vivaj. La ĉevalejoj estis plenplenaj de ribelintoj el la najbaraj vilaĝoj.

Post ankoraŭ multaj tagoj la arestitoj en la kazerno estis translokitaj al Danubo en fiodorajn barĝojn, kien mi ne povis eniri, sed sukcesis transdoni al ili leterojn, kaŝante ilin en la panmezon.

La kruelaĵoj de la faŝistoj-ekzekutistoj daŭris longan tempon. Ili enterigis la mortigitajn herojn de Septembro 1923 en la sablaron apud rivero Lom, en la kamparon, ĵetadis ilin en Danubon...

En komunan tombon ĉe la nordorienta rando de la tombejo estis ĵetitaj dekoj da septembruloj. Post kelkaj tagoj sur la tombo iu metis krucon. Sur ĝi mi kaj mia kamarado skribis: „Pereintaj de krimula mano“. Iu alia elviŝadis la surskribon, tamen ni ĝin restarigadis.

Heroaj kaj kruelaj tempoj! Tiam ni ĵuris antaŭ la memoro de la pereintoj, ke ni daŭrigos ilian faron kaj vengos ilin. Kaj ni plenumis nian ĵuron.

IVAN KEREMIDĈIEV — ESPEROV



RIBELA KORDO, de Ĥristo Gorov, p. 71, 14x20 cm, broŝurita, Budapeŝto, 1983.

La leganta E-publiko jam havas je sia dispono la novan poemaron de Ĥristo Gorov. Ĝi inkludas dek poemojn, originale verkitajn en Esperanto, kaj koncizan aŭtobiografion de la aŭtoro. Naŭ el tiuj poemoj aperis antaŭ kaj post la Dua Mondmilito en diversaj esperantistaj gazetoj kaj nun por la unua fojo ili aperas libroforme.

En la enkonduka poemo „Post la Fronto“ (p. 5–7), la aŭtoro pentras la pezan vivon kaj la suferojn de la loĝantaro iuloke en Balkanio, iom antaŭ la fino de la Unua Mondmilito. Tio estas rememoroj de la aŭtoro pri la impresoj el lia knaba aĝo. Naturaj kaj sociaj bildoj estas prezentitaj en ampleksa panoramo, kiu konvinkas kondamnas la militon, ŝovinismon, ekspluatadon, kaj direktas plu la penson kaj la sentojn de la leganto al la aspirata paco, al rekonstruo de la nacia kaj socia vivo de la popoloj sur la principoj kaj la postuloj de la reala humanismo.

La dua ingredienco de la poemaro estas la tre ampleksa „Poemo de l'Plugisto“. Fakte ĝi

okupas du trionojn el la spaco de la traktata verko (p.9—51). La poemo estas verkita en 1929 kaj estis aperigita en memstara libro de la eldonejo de SAT en Parizo, 1930.

La titolo mem „Poemo de l'Plugisto“, kvaŭzaŭ aludas al la scivolema leganto, ke temas pri monolita verko, sed kiam tiu foliumas la paĝojn, li restas „elrevigita“, ĉar evidentiĝas, ke temas pri poemkolekto, konsistanta el trideko da sinsekve numeritaj versaĵoj. Ĉiu el ili havas propran titolon kaj en difinita volumeno traktas sian objekton. Do, antaŭ ol komenci la legadon de la verko, la poeziŝatanto estas serioze konfuzita, ĉar li ne povas diveni la ĝeneralan planon de la poemo. Ĉu poemaro aŭ poemego? Ĉu temas pri monolita poemo, kiel aludas la titolo, aŭ pri poemkolekto, kiel „pruvas“ la supra trarigardo?

Sed komencinte legi, post kelkaj paĝoj oni komprenas, ke temas pri unueca poemo, kaj ke la 29 versaĵoj, kiuj konsistigas ĝin, estas numeritaj ne hazarde. Kvankam ĉiuj versaĵoj estas memstaraj poeziperletoj, ordigitaj en difinita sinsekvo, ili aperas kiel paneloj, el kiuj estas konstruita unueca epos-poemo pri la vivo kaj perarmila batalo antaŭ, dum kaj post la unua en la mondo Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en Bulgario (1923).

„Poemo de l'Plugisto“, verkita antaŭ 54 jaroj de la tiam 20-jara laboristo, Ĥristo Gorov, sendube portas ankaŭ nun la freŝecon kaj la aromon de arbar-viojoj, la tranĉodoron de pinrezino kaj de pulvofumo. . .

En la poemo „Ribeluloj“ (p. 52—55) estas majstre pentrita unu epizodo el la perarmila rezistado de la bulgara popolo en la jaroj post la malvenko de la Septembra Ribelo. Ĝi estas verkita en 1929 kaj aperas en „Balkana Laboristo“ (II, 3, p. 37—40, novembro 1929, Sofio). Oni devas ĝin konsideri kiel daŭrigon de „Poemo de l'Plugisto“, ĉar ĝi traktas la perarmilan batalon kontraŭ la „blanka“ teroro de la faŝista reĝimo. En la suda parto de Burgas-distrikto (Grudovo) la aganta tie ribelula taĉmento elmigris en Jugoslavion (1926) kaj tie disfalis. Taĉmento de tiu speco agadis plej daŭre en la distrikto de Stara Zagora. Sed post gravaj perdoj en 1936 ankaŭ ĝi disfalis. Do, la lasta eĉo de la Septembra Ribelo fakte silentiĝis post 13 jaroj en la distrikto de Stara Zagora (1936). En la nuna eldono la aŭtoro ege reduktis tiun ĉi poemon, la esenco tamen restas netuŝita.

En „Fabelo pri la Rivero“ la aŭtoro antaŭvidas la proksiman venkon de la liberiga socialisma revolucio. Tiu antaŭvido estas farita en 1931 kaj post 13 jaroj ĝi realiĝis en Bulgario (en septembro 1944).

La rapide kreskanta forto de la Rivero, t. e. de la kontraŭimperiisma revolucio, devenas el la intensa kresko de la laboristklasa memkonscio kaj el la kreo de batalkapabla organizo por la laboristoj kaj por la ceteraj laboruloj (metiistoj, mezriĉaj kaj malriĉaj vilaĝanoj).

En la ceteraj poemoj Ĥristo Gorov konstruas versmonumentojn al siaj pereintaj kamaradoj kaj kunbatalantoj: „Sen Laboro“ (1939, p. 56—60), dediĉita al la kudristo Kosta Penev, kiu pereis en la batalo kontraŭ la faŝismo por libero de la Hispana Respubliko; „La Partizano Asparuh“ (1965, p. 62); „Partizano Ljuben“ (1980, p. 61—62). En la poemo „Septembra Balado“ Gorov tre originale prezentas, kiel dum-

nokte la ombro de la pereinta partizano eliras el la marmora monumento kaj vagas tra loĝlokoj kaj kampoj, por ĝui sian realigitan revon. En la poemo „Patrino atendas...“ la aŭtoro senmaskigas la kruelecon de la faŝistoj, kiuj per torturoj detruis la sanon kaj kaŭzis la morton de David Sasonov, filo de rabeno, sperta esperantisto kaj komunisto-batalanto. David Sasonov kune kun Ĥristo Gorov tradukis en Esperanton kaj eldonis (1931) la revolucionan poemon de Geo Milev „Septembro“. Kaj fine, en la deka poemo „Martirino akuzas...“ Ĥristo Gorov esprimas sian internacian solidarecon al la usona esperantistino Alice Herz, kiu sin bruligis por atentigi la mondon pri sia protesto kontraŭ la usona agreso en Vjetnamio.

La verko estas presita sur bona blanka papero kaj la presaĵo estas tre klara kaj agrabla. Ĝi estas libro por ĉies libroreto.

CANKO MURGIN

MLADEN ISAEV — POETO DE LA REVOLUCIA IMPETO



La eminenta bulgara poeto Mladen Isaev estas naskita la 7-an de junio 1907 en vilaĝo Baljuvica, distrikto de Miĥajlovgrad. Gimnazion li finas en urbo Vraca. Li partoprenas la Septembran Ribelon en 1923. En 1926—1927 estas elmigrinto en Jugoslavio. Forste estas kondamnita al 2-jara malliberigo ĉe severaj kondiĉoj, laŭ la leĝo por Defendo de la Ŝtato. Depost 1927 estas membro de la Bulgara Komunista Partio.

Mladen Isaev redaktas gazeton „Eĥo“ (1930—1934), estas respondeca sekretario de revuo „Nia Penso“ (1931—1932). Li laboras ankaŭ en la redakcioj de aliaj kontraŭfaŝistaj literaturaj eldonoj; partoprenas en la redaktado de gazeto „Rabotničesko Delo“. Li estas kunlaboranto en la Centra Militkomisiono de CK de BKP (1942). En 1942 estas arestita kaj juĝita en la proceso de CK de BKP kaj proskribita en la koncentrejoj „Kraŝto Pole“, „Gonda Voda“ kaj „Sankta Kirik“. Partoprenas kiel volontulo en la Patrolanda Milito (1944—1945). Estas sekretario (1944—1947, 1956—1958) kaj vicprezidanto (1962—1966) de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj, vicĉefredaktoro de gazeto „Literaturen Front“ (1958—1960).

La verskolektoj de M. Isaev, aperintaj en la periodo 1932—1938, malkovras la mondkoncepton de la poeto-komunisto, kiu protestas kontraŭ la arbitraĵoj kaj la tiraneco de la faŝista ŝtatpovo, revas pri liberaj homaj interrilatoj. Sekvante la revoluciajn tradiciojn de la bulgara literaturo, Isaev prezentas la heroajn kaj majestajn momentojn en la batalo de la bulgara popolo en la pli malproksima pasinteco kaj dum la Septembra Kontraŭfaŝista Ribelo 1923, la doloron pri la pereintoj kaj la kredon je la estonta venko. Al la septembra temo la poeto revenas ankaŭ pli malfrue — en „La Kolero“ (Septembra poemo, 1973).

En la versaĵoj, dediĉitaj al la Patrolanda Milito 1944—45 („La Fajro“, 1946) Isaev priskribas la figurojn de sinoferaj herooj-patriotoj, prikantas la amikecon kun la sovetaĵ soldatoj.

En sia liriko Mladen Isaev prezentas la spiritan mondon de sia nuntempulo (en la verskolektoj „Fajro“, 1946, „Amo“, 1954, „Altaĵo“, 1969 ka). Liaj verkoj estas saturitaj de forta patriota sento kaj revolucia romantiko. Li estas aŭtoro ankaŭ de poemoj („Poemo pri la karabeno“, 1947, „Poemo pri Vapcarov“, 1948), de memuaroj („Neforgeseblaj travivaĵoj“, 1976, dua eldono 1979) kaj de multaj verkoj por infanoj kaj adoleskantoj.

Mladen Isaev tradukis el la rusa lingvo verkojn de A.S.Puŝkin, A.A.Blok, S.A. Esenin. Pro liaj ta-

lantaj tradukoj li estas distingita per la soveta ordeno „Signo de honoro“ (1967).

Pro lia aktiva partopreno en la konstruado de la bulgara socialisma kulturo, Mladen Isaev estas honorita per la altaj registaraj distingoj de PR Bulgario: Heroo de la Socialisma Laboro (1967), Laŭreato de Dimitrov-premio (1971), Heroo de Socialisma Laboro (por dua fojo — 1977).

Okaze de lia 75-jariĝo kaj pro lia kompleta kreolaboro kaj meritoj, per dekreto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario de la 22. 9. 1982, li estas distingita per la plej alta ŝtata titolo Heroo de Popola Respubliko Bulgario.

Ĉi-sube ni donas lokon al du liaj versaĵoj, dediĉitaj al la Septembra Ribelo 1923;

ĈE RIVERO OGOSTO

Degelas jam de l'sun la oro
sur neĝaj montoj en silent'.
De l'gregoj la vespersonoro
sur kamp' foreĥas en dezert'.

Sub firmamento grize nuba
silentas prujna la arbar',
Mi marŝas kaj la arboj nudaj
fantome staras en malklar'.

Ogosto nun mallaŭte kantas
pri la viktimoj en batal',
pri la aŭtuno hurla, sanga,
lasinta landon en fatal'...

Kaj tiuj branĉoj senfoliaj
sin batas en malvarma bord',
en stranga lum' post sangorgio
la akvon kolorigas mort'...

1931

Tradukis: VIOLIN OLJANOV

NOKTOJ BLANKAJ

Noktoj blankaj kiel osto.
Flav-aŭtuno. Nigra mort'.
Sub salikoj de Ogosto¹
freŝaj tomboj en senord'.

En vesper' patrinoj venas
al ĉi tiu bord' en trist'
kune kun dolor' venena
pro murdita komunist'.

Noktoj blankaj kiel osto.
Flav-aŭtuno. Nigra mort'.
En la kampoj ĉe Ogosto
lupoj hurlas en kohort'...

1931

Tradukis: GANKO MURGIN

¹Ogosto — rivero en Nord-okcidenta Bulgario. En ĝia valo eksplodis kun plej granda forto la kontraŭfaŝisma ribelo en septembro 1923.



TAGOJ DE LA ESPERANTA KULTURO, SOFIO'83

Ĉu ekzistas Esperanta kulturo?

Tiun ĉi demandon dum pluraj jaroj multfoje starigis la malamikoj de la Internacia Lingvo. Tamen la vivo pruvis la ekziston de riĉega Esperanta kulturo: originalaj verkoj (beletraĵ, dramaturgiaj kaj poeziaj), tradukoj en Esperanton de ĉefverkoj de naciaj literaturoj, esploroj kaj studoj en diversaj branĉoj de la scienco, centoj da periodaĵoj — gazetoj, ĵurnaloj, bultenoj, radioelsendoj en Esperanto ktp.

Serioza argumento pri la ekzisto de esperanta kulturo estas ankaŭ la organizitaj duan fojon en nia lando, la 17—19-an de junio ĉi-jare, Tagoj de la Esperanta Kulturo Sofio '83, dediĉitaj al tri rimarkindaj datrevenoj: 165 jaroj de la naskiĝo kaj 100 jaroj de la morto de Karl Marx, 50 jaroj de la Lejpciga proceso kaj 60 jaroj de la unua en la mondo kontraŭfaŝisma Septembra Ribelo en 1923.

En la programo al la tagoj de E-Kulturo '83 estis notitaj: du koncertoj, scienc-praktika konferenco, literatura legado kaj vizito de urbo Bankja.

Do, ni donu la parolon al niaj raportantoj:

M. Angelova: Riĉa koncerta programo

La oficiala malfermo de la Tagoj de Esperanta Kulturo'83 okazis la 17-an de junio, en la halo de legejo „Emil Sekerĝijski“, per solena koncerta programo.

La Ĥoro de la Sofiaj Esperantistoj kaj la novekreita kordkvarteto „Espero“ malfermis la Tagojn per plenumo de la bulgara nacia himno kaj de la esperantista himno „La Espero“.

Sekvis mallonga malferma parolado de **Haim Levi**, vicprezidanto de la Sofia Urba Estraro de BEA kaj direktoro de la E-Kulturcentro „M. Gorkij“

La muzika programo komenciĝis per 3 plenumoj de kvarteto „Espero“, gvidata de R. Dojĉinov. Maria Angelova kaj Stefka Kalimenova plenumis tre stile „La torento“ de Marcello kaj ankaŭ la popolkanton „Biljana“ en akompano de la kvarteto. La poemo „Septembro“ de Geo Milev, plenumita de la aktorino Angelina Sotirova, sonis emocie kaj kaptante. M. Karamihajlov en plej agrabla maniero transportis la spektantojn en la patrolandon de L. Zamenhof per unu el la popularaj komponaĵoj de Chopin — Valso en do diez minor. Brile manifestiĝis la majstreco de J. Strateva kiel violonistino.

Efektaj kaj agrablaj estis la kantoj de la merita artisto Veselin Damjanov, kiun lerte akompanis per piano la merita artisto E. Komarov.

La koncerto finiĝis per la unuakta komedio „Divorco“ de I. Slonova, prezentita de la ŝatataj E-geaktoroj B. Beleva kaj A. Anev.

La sekvan tagon — la 18-an de junio, en la sama salono okazis koncerto, en kiu sin prezentis 3 esperantistaj artkolektivoj.

La koncerto komenciĝis per plenumo de la Ĥoro de Blindaj Esperantistoj, gvidata de Miĥail Karamihajlov. Belsone kaj harmone estis plenumitaj kvar kantoj — ilin kronis „Bela Kalina“ de G. Spasov, en kiu potence kaj bele eksonis la voĉo de la solisto-baritono St. Paskulev.

La Ĥoro de la Sofiaj Esperantistoj kun ĥorestro D. Terziev, memfide sin prezentis per sia konata repertuaro.

Multajn aplaŭdojn provokis la vivĝoja kaj bela plenumo de la 25-membra lernejana folk-lora voĉa-instrumenta ensemblo ĉe la legejo en vilaĝo Gorno Dragliŝte, Blagoevgrad-distrikto kun sia bonega gvidanto G. Durev.

La eksterordinara sukceso de ambaŭ koncertoj estas ŝuldata al la alta majstreco de ĉiuj plenumantoj.



Solena malfermo de la Tagoj de E-kulturo



Recitas Angelina Sotirova

V. Baleva: Ni ĝuis majstran laboron...

La 17-an de junio ĉi-jara vespere en la kunvenejon de la Sofia E-Kulturcentro „M. Gorkij“ sur str. Serdika 13 senĉese eniris feste vestitaj homoj — multaj geesperantistoj el Sofio kaj el la tuta lando venis ĉi tien por partopreni la malfermon de la ekspozicio de esperantistoj-pentristoj.

Inĝ. Petăr Todorov, vicprezidanto de BEA, malfermis la solenaĵon per mallonga parolo. Li substrekis la gravan rolon de l'arto en la batalo por paco, en kies unuaj vicoj estas la esperantistoj.

La ĉeestantoj trarigardis la ekspozicion. Siajn verkojn ekspoziciis s-no Ivan Sivarov el Plovdiv, d-ro Sl. Strezov, prof. Radoslav Dojĉinov, la profesia pentristino kaj nia agema samideanino Katja Maneva. Siaj verkoj estas maturaj kaj allogas per la beleco de la prezentita naturo.

Evidentiĝis la prefero de I. Sivarov al la morta naturo. Liaj oleopentraĵoj estas freŝaj kaj kolorriĉaj.

Estis interese vidi la portretojn kaj pejzaĝojn de d-ro Strezov. Iom naive pentritaj, ili tamen forte impresas per la ĝusteco de prezentado. Ĉiujn amuzis la karikaturoj de R. Dojĉinov — profesoro de muziko. La klara kaj senerara linio de liaj desegnaĵoj parolas pri serioza kompreno de la homa karaktero.

Per du skulptaĵoj sin prezentis la pentristo-esperantisto Ivan Culev: „Lenin“ (kapo) kaj „Cevalo“ (reliefo).

Aparte altiris la atenton de la publiko la afiŝoj kaj desegnaĵoj pri Esperanta kaj paca temoj, donacitaj de samideano Konstantin Barjoveanu (Rumanio).

Ĉiu el la prezentitaj pentraĵoj prezentas malgrandan mondon el koloroj kaj sentoj, el nuancoj kaj ludo de lumo kaj ombro. Ni ĉiuj ĝuis la majstran laboron de niaj gesamideanoj-pentristoj kaj ni esperu, ke la sekvajn E-ekspoziciojn partoprenos pli multaj esperantistoj-pentristoj.



En la ekspozicio de pentristoj-esperantistoj

D. Ĥitrov: Vera popola universitato...

Sabate, la 18-an de junio, en la 10 h., en la salono de la E-Kulturcentro „M. Gorkij“ sur str. Serdika en Sofio kolektiĝis multaj sofiaj geesperantistoj kaj gastoj el la provinco por partopreni la Scienc-Praktikan Konferencon — gravan kaj ege interesan programeron de la Tagoj de Esperanta Kulturo Sofio '83.

La ĉeestantoj aŭskultis du enhavoriĉajn interesajn prelegojn: „La internacia Lingvo Esperanto — rimedo en la batalo de la popoloj por paco, kunlaborado kaj internacia interkompreniĝo“ — de Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM, kaj „La ideoj de Karl Marx“ — plej solida fundamento por venko de la paco, progreso kaj interkompreniĝo de la popoloj“ de Canko Ignev, kandidato de filozofiaj sciencoj.

„Estas tute nature dum la Tagoj de la Esperanta Kulturo Sofio' 83 trakti ankaŭ la problemon pri paco, internacia kunlaborado kaj interkompreniĝo de la popoloj, — diris en sia prelego N. Aleksiev. — La esperanta kulturo estas parto de la tuthomara kulturo. Kiel ĉiu kulturo, ankaŭ la Esperanta kulturo bezonas normalajn internaciajn kondiĉojn por sia natura evoluo. Normalaj internaciaj kondiĉoj — tio signifas antaŭ ĉio paca kunekzistado de ĉiuj popoloj, sendepende de ilia sociordo.

Docento Canko Ignev profunde kaj argumen-

tite analizis la ideojn kaj la sciencan teorion de Karl Marx kaj Friedrich Engels por homa progreso en paco kaj interpopola kompreniĝo — ege aktualaj nuntempe, kiam la mondo estas minacata per neniigo flanke de la usonaj imperiistoj kaj militemuloj.

Post la paŭzo, kiel kutime, okazis vigla diskutado pri la prelegoj, kio donas al niaj sciencpraktikaj konferencoj la trajtojn de popola universitato por internaciismo, demokratismo kaj pacdefendo.

L. Raeva: Esperanto taŭgas por poezio

La Literatura Legado enkadre de la Tagoj de Esperanta Kulturo okazis la 18-an de junio posttagmeze.

La klubejo de la E-Kulturcentro „M. Gorkij“ havis festan aspekton. Ĉeestis niaj E-verkistoj kaj poetoj — la pliparto el ili membroj de la Literatura Rondo, gvidata de Asen Grigorov, kaj ankaŭ multaj gastoj — ŝatantoj de poezio, beletristiko kaj deklamado.

La aranĝon gvidis **Rajna Konstantinova** — unu el la plej malnovaj kaj fidelaj membroj de la Literatura Rondo kaj konata E-verkistino.

Per siaj originalaj versoj, kiujn li mem deklamis, sin prezentis nia ŝatata E-poeto kaj prezidanto de BEA k-do Hristo Gorov (li deklamis fragmentojn el siaj poemoj „Ribeluloj“ kaj „Fabelo pri la rivero“, el lia ĵus aperinta poemaro „Ribela Kordo“).

Siajn verkojn legis ankaŭ V. Oljanov („Amikoj“), Todor Soŝev („Svejen“, „Al ŝi“ kaj „Sunradioj“), Penka Papazova el Jambol

(„Mia sankta ter“), Rajna Konstantinova (la aŭtentikan rakonton „Alaŭdoj“), Asen Josifov („Alvoko al la nuntempa mondo“, „Al la tutmonda esperantistaro“) k.a.

Oni deklamis ankaŭ verkojn de Asen Grigorov („Gardu la pacon“), de Nevena Nedelĉeva („La koro de poeto“), de Ljuba Bojaĝieva („La manoj de virinoj“).

Nia konata E-aktoro kaj verkisto Mihail Ĉobanov legis sian tradukon en Esperanto de la popolkanto „Stojan kaj drakino“.

Konklude mi volas diri, ke la E-poetoj kaj verkistoj de la pli maljuna generacio per sia multjara obstina laboro sur la literatura kampo brile pruvis, ke Esperanto taŭgas por poezio. La ĉi-jara Literatura Legado estis nova serioza pruvo de tiu fakto (interalie, jam de longe pruvita). Nun la parolon havas la pli juna generacio en la bulgara E-movado.

Do, ni esperas dum la estontaj Tagoj de la E-Kulturo vidi sur la podio junajn kaj talentajn E-poetojn kaj verkistojn.

L. Milkova: Bankja bonvenigis gastojn

Finaranĝo de la riĉa programo de la Tagoj de E-Kulturo' 83 estis vizito en la fama kuracloko Bankja.

Jam ĉe la stacidomo oni povis eksenti Esperantan etoson: bonveniga slogano, verdstelaj flagoj kaj la dommastroj, varme salutantaj la gastojn. Similan gastamon oni ĝuis ankaŭ en Vraca, en Kazanlâk, Karlovo kaj Stara Zagora dum la ĉi-jaraj E-aranĝoj de BEA.

Post la du tagoj, ege saturitaj de koncertoj, ekspozicio kaj scienc-praktika konferenco, la vizito en Bankja estis tago de ripozo, de senperaj kontaktoj inter la partoprenintoj en la Tagoj de E-Kulturo.

Post la kora bonvenigo fare de la loka E-estraro ni direktiĝis al iu el la multnombraj ripozdomoj, kie nin bonvenigis Kunĉo Vâlev, ĝenerala sekretario de CE de BEA

kaj infanoj-partoprenantoj en la E-konferenco pri problemoj de la korespondado. En la nomo de la Urba Komitato de BKP kaj de la Komunuma Popola Konsilantaro nin salutis ankaŭ ties reprezentanto Vasev, kiu koncize konigis al ni la pasintecon kaj la nuntempon de la urbo kaj la planojn pri evoluo de Bankja kiel nacia kaj internacia kuracloko, fama pro siaj mineralaj akvoj, sanatorioj kaj profilaktejoj.

Interesa kaj informoplena estis la vizito al la Respublika Resaniga Centro, kies ĉefkuracisto d-ro Zahariev, kandidato de la medicinaj

toj el Bankja regalis siajn gastojn per la fama loka specialaĵo — ŝafjogurto kaj platpanetoj. Agrabla, bonega fino de riĉa je programeroj E-arango.

* * *

La Tagoj de E-Kulturo '83 pasis sukcese — ili estis brila demonstracio de niaj atingoj en la sfero de kulturo kaj arto. Sed por niaj legantoj certe ne estus seninterese scii ankaŭ



Partoprenintoj en la Tagoj de E-kulturo dum vizito en Bankja
(Fotoj: Lada Milkova)

sciencoj, informis la gastojn pri la agado de la Centro. Ĉe la disigo, dekoritaj per verdstelaj insignoj, la kuracistoj promesis organizi kurson de Esperanto en la Centro.

En la Domo-muzeo de Dimităr Blagoev oni eksciis malmulte konatajn interesajn faktojn el la vivo de la patriarko de la socialisma agado en Bulgario. Dum la lastaj jaroj de sia vivo D. Blagoev kuracis sin en Bankja kaj verkis tie siajn tre valorajn rememorojn.

Antaŭ la forveturo la gastamaj esperantis-

la pritakson de la organizantoj. Jen kion dividis kun ni Haim Levi, vicprezidanto de UE de BEA kaj direktoro de la E-Kulturcentro „M. Gorkij“: „La Tagoj de E-Kulturo Sofio '83“ pasis interese kaj varie, saturitaj de riĉa ideateoretika kaj estetika-eduka enhavo. Per ilia organizo kaj efektivigo estis metita komenco de utila tradicio, kiu allogas kaj certe allogos estonte ĉiam pli multajn homojn. Oni povas aserti, ke la bona anticipa preparlaboro kontribuis por la bonaj rezultoj.“



LA UNUA DE SEPTEMBRO — MONDA PACTAGO

Estas tagoj, en kiuj la tuta progresema mondpubliko, dekoj kaj centoj da milionoj de laboruloj, viroj, virinoj kaj infanoj el la kvin kontinentoj de nia planedo donas unu al la alia manon en la nomo de althumana, profunde nobla celo. Tiel estis ankaŭ ĉi-jare je la Unua de Septembro — la Monda Pactago.

La elekto mem de la dato estas indika. En la fruaj matenaj horoj de tiu tago en 1939 Hitlera Germanio inside atakis Pollandon. Komenciĝis la Dua Mondmilito. Pereis pli ol 50 milionoj da homoj. La mondo, kortuŝita, eksciis ankaŭ pri la viktimoj de la unuaj atombombadoj sur Hiroŝima kaj Nagazaki.

Por ke neniam ripetiĝu la teruroj de monda incendio, por ke ne estu cindrigita la planedo Tero, por ke ni certigu krear paclaboron, la unua septembra tago estis honorita tutmonde per grandskalaj kontraŭmilitaj mitingoj kaj pacmarŝoj.

Vi vidas fotojn el la amasaj mitingoj en Sofio — antaŭ la monumento „1300 jarojn Bulgario“, en kiu parolis la prezidanto de la Centra Konsilio de Bulgaraj Profunuigoj Petăr Djulgerov, kaj en la Mastruma Metalurgia Kombinato „Leonid Breĵnev“ en Kremikovci apud Sofio.



ISEU'83 — SUKCESA KOMENCO!



Prof. Angel Davidov, rektoro de la Universitato „Kiril i Metodij“ en Veliko Târnovo kaj rektoro de ISEU, salutas la partoprenantojn

(Foto: Zdravko Nikolov)

Jam delonge la bulgaraj esperantistoj kaj precipe la esperantistoj en Veliko Târnovo revis pri grava, interesa kaj konstanta internacia E-arango. Kaj fine ilia revo efektiviĝis — en la antikva, tamen eterne juna universitata urbo Veliko Târnovo okazis la unua en nia lando Internacia Somera Esperanto-Universitato (ISEU).

Ĉe la malfermo de ISEU'83, la 18-an de julio j. k., ĉeestis pli ol 100 esperantistoj. Malferman salutparoladon faris prof. Angel Davidov — rektoro de la Universitato „Kiril i Metodij“ en Veliko Târnovo, mem esperantisto. Prof. Davidov substrekis la gravan rolon de ISEU por la bulgara kaj internacia E-movado.

Salutvortojn al la partoprenantoj en ISEU direktis ankaŭ Sergej Danĉev el fako „Kulturo“ ĉe la Urba Popola Konsilantaro en Veliko Târnovo. Li alte pritaksis la kontribuon de la esperantistoj por la internacia kultura kaj scienca interŝanĝo, ilian noblan kaj respondecan laboron por kreo de amikeco kaj bonaj sentoj kaj rilatoj inter homoj kaj popoloj trans la limoj, por stabiligo de la tutmonda paco.

Dum la sekvaj tagoj en la prelegejo regule ĉeestis ĉirkaŭ 60 gesamideanoj, el ili 55 bulgaroj kaj, bedaŭrinde, nur 5 eksterlandanoj (el CSSR, Hungario kaj Danlando). Kvin tagojn

en Veliko Târnovo kaj du tagojn en la ĉedanuba urbo Svištov la partoprenintoj havis la eblecon aŭskulti 19 prelegojn, el ili pri temoj de la socipolitika kaj sociala vivo — 4, pri medicino — 3, pri historio, natursciencoj kaj kemio — po 1, pri arto — 2 kaj pri esperantologio, interlingvistiko kaj E-movado — 7. Kiel oni vidas, en la temaro superregis la E-temoj. Tio estas tute natura: sendepende de siaj aĝo, sekso, profesio kaj lingva nivelo la esperantistoj ĉiam manifestas viglan intereson al tiuj temoj. Inter la prelegoj aparte interesaj estis tiuj de prof. d-ro Paul Neergaard el Kopenhago, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto („Akademio de Esperanto“, „La evoluo de Esperanto“, „Plantmalsanoj kaj malsatkatastrofoj“); de prof. d-ro Stojan Guĝev el Sofio, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto („Estetikaj problemoj en la interlingvistiko“, „Lingvaj konfliktoj kaj diskriminacioj“). Estis vere eminenta sukceso por nia ISEU havi la du vicprezidantojn de la Akademio kiel prelegantojn. La publiko aparte admiris iliajn prelegojn, kaj la diskutoj montriĝis tiel aktivaj, ke foje estis necese prokrasti prelegon por la sekva tago.

Bonegaj estis ankaŭ la prelegoj de d-ro Arpad Máthé el Budapeŝto („Esperanto en la scienco“, „La plasto en nia ĉiutaga vivo“).

Same interesaj estis la prelegoj de Belka Beleva el la Supera Instituto de Teatra Arto en Sofio („Esperanto kaj la teatra ludo“), de Cano Ignev, kandidato de la filozofiaj sciencoj („Socialaj funkcioj de la arto“), de profesoroj Kiril Popov (pri medicinaj temoj) kaj Hristo Marinov el Svišov („La problemoj pri nutrado de la mondo“ kaj „La ekologia estonteco de nia planedo“), de K. Vălev („Pri la vortkunmetado kiel baza principo en la sintakso de Esperanto“). Gravan kontribuon prezentis ankaŭ la prelego de Nikola Aleksiev — heroo de la socialisma laboro („Georgi Dimitrov kiel venkinto en la porpaca batalo“) kaj de Nano Kjuĉukov, merita aganto de la kulturo („La Septembra Ribelo 1923 — rimarkinda evento en la historio de Bulgario“). La temaro de ISEU estis varia, aktuala kaj — kio estas tre grava — kompetente prezentita. Post ĉiu prelego sekvis fruktodona diskutado.

En Veliko Târnovo la prelegantoj estis oficiale akceptitaj de la vicprezidentino de la Komunuma Popola Konsilantaro Janĉeva. En Svišov ĉiuj universitatanoj partoprenis oficialan renkontiĝon kun doc. Mojnov — vicdirektoro de la Supera Financa-Ekonomia Instituto.

Enkadre de ISEU oni havis la eblecon trigardi tri urbojn — Veliko Târnovo Gabrovo kaj Svišov. Per siaj multnombraj historiaj kaj kulturaj monumentoj Târnovo faris for-

tan impreson al ĉiuj universitatanoj. Ili ĝuis la unikan amfiteatran situon de la urbo, la pitoreskajn meandrojn de rivero Jantra, kiu, serpentumante, dispartigas la urbon. Aparte ilin emociis la fama Carevec — cara rezidejo dum la Dua Bulgara Regno. En Gabrovo, kiun oni atingis per aŭtobuso, oni vizitis la unikan Domon de Humuro kaj Satiro kaj la ege interesan arkitekturan-etnografian komplekson „Etăr“. Survoje al Gabrovo oni vizitis ankaŭ la monaĥejon de Drjanovo.

Oni ekskursis ankaŭ al vilaĝo Arbanasi, fama per siaj malnova arkitekturo kaj hejma arango kaj vizitis najbaran monaĥejon „Petropavlovski“.

En Svišov la universitatanoj trarigardis la Domon-muzeon de la konata bulgara verkisto Aleko Konstantinov — la senmorta aŭtoro de „Baj Ganju“, kaj vizitis ekster la urbo la lokon, kie en junio 1877 la rusa armeo transiris Danubon por liberigi la bulgaran popolon elsub la 500-jara otomana jugo.

Ĉiuj partoprenantoj en ISEU esprimis sian grandan kontentecon pri tiu interesa kaj ege utila E-arango.

ISEU'83 jam estas fakto. Ĝi tre bone startis kaj ĝiaj unuaj paŝoj estas garantio, ke dum la sekvaj jaroj ĝi fariĝos nova populara kaj preferata fajrujo de la E-kulturo kaj internacia amikeco, de pacamo kaj humanismo.

K. VĂLEV

Prof. Angel Davidov:

„ISEU estos nova kaj tre utila arango...“

Karaj gekolegoj kaj gastoj,

En la kompleksa programo de Bulgara Esperantista Asocio por la kuranta jaro oni antaŭvidis la organizon de Internacia Somera Esperanto-Universitato (ISEU) en Veliko Târnovo kaj Svišov. Mi opinias, ke ISEU estos nova interesa kaj tre utila arango ne nur por la bulgara, sed ankaŭ por la internacia Esperanto-movado.

Veliko Târnovo ne hazarde estis elektita kiel urbo, en kiu estonte ĉiujare okazos la Internacia Somera Esperanta Universitato.

Jam en 1888 en Veliko Târnovo estas ardaĵe adeptoj de la internacia lingvo Esperanto, kaj rajte oni nomas nian urbon lulilo de la esperantismo en Bulgario.

En Veliko Târnovo kunsidis la unua nacia E-kongreso en 1907. Tiam estis fondita la Bulgara Esperantista Asocio, kies 75-jaran jubileon oni festis pasintjare en nia universitato.

E-societo „Lumo“ en Veliko Târnovo estas la plej malnova en nia lando kaj nun en ĝi membras ankaŭ lektoroj kaj studentoj el la universitato.

Dum sia dudekjara ekzistado la universitato „Kiril i Metodij“ en Veliko Târnovo fariĝis nacia centro

de scienco, klerigo kaj arta kreado. Tiurilate ĝi daŭrigas la tradiciojn de la malnova Literatura Skolo de patriarko Evtimij en Târnovo (XV jc), kiu finkeis sur la monteto „Sveta Gora“, sur la sama loko, kie hodiaŭ estas nia universitato. Tiu skolo ludis la rolon de mezepoka universitato kaj grave efikis sur la formadon de la kulturo, literaturo kaj literaturaj lingvoj en tuta Sudorienta Eŭropo.

Dum sia ekzistado la universitato preparis pli ol dek mil junajn fakulojn. Hodiaŭ en ĝi studas ĉirkaŭ kvar mil gestudentoj en la fakoj: filologio, historio, pentroarto kaj plastiko kaj sociaj sciencoj.


Nia universitato havas kontaktojn kun multaj universitatoj en Eŭropo. Niaj profesoroj estas lektoroj de bulgara lingvo en Leningrado, Lvov, Romo, Bruselo, Bukureŝto, Krajova, Szeged ktp.

Jam sep jarojn en nia universitato ĉiujare okazas unumonata seminario por junaj eksterlandaj specialistoj pri bulgara lingvo, literaturo kaj historio. En ĝi partoprenas meze po 120 specialistoj en 35 landoj de la tuta mondo.

Kaj de nun en nia urbo, en nia universitato okazos ankaŭ la Internacia Somera Esperanto-Universitato.

En la nomo de la estraro de universitato „Kiril i Metodij“ mi esprimas nian profundan dankon pro la alta honoro esti dommastroj de tiu grava E-arango.

**Prof. d-ro Paul Neergaard:
„Iom pri mi mem, iom pri ISEU en
V. Târnovo kaj iom
pri Esperanto kaj nia nuntempa
mondo...”**



Amike ridetante, prof. d-ro Paul Neergaard, eminentulo en la scienca kaj esperanta mondo kaj partopreninto en la Internacia Somera Esperanto-Universitato (ISEU) en Veliko Târnovo, estis afabla respondi al miaj demandoj.

— KIU ESTAS VI, PROF. NEERGAA?D?

— Antaŭ nelonge dana eldonisto starigis al mi la saman demandon kaj ege embarasis min. Mi provos respondi kontentige al via demando. Mi atingis la sciencan sferon pene kaj malrapide. Mi ne estis tre bona lernanto — speciale pri angla lingvo kaj botaniko. (Tamen okazis tiel, ke post jaroj mi verkis pli ol mil paĝojn pri botaniko en angla lingvo!...) Mi kredis, ke mi ne kapablas esti studento kaj pro tio mi estigis ĝardenisto. Mi zorgis pri la gazono kaj, laborante en la ĝardeno, mi havis multe da tempo por pensado, por meditado. Eble tiu laboro havis signifon por mia decido studi en la Agronomia Universitato en Kopenhago. Fininte miajn studojn en la universitato, mi decidis doktoriĝi pri plantpatologio. Mi neniam trotaksis miajn sciojn kaj pro tio mi enoficiĝis kiel plantpatologo ĉe iu dana firmao. Tie mi havis avorajn kondiĉojn okupigi pri mia doktora tezo, kiun

mi sukcese defendis per 600-paĝa scienca verko en angla lingvo, kun resumo en Esperanto! En 1966 la dana Ministerio de Eksteraj Aferoj invitis min fondi Statan Instituton pri sempatologio por evoluantaj landoj (pri epidemiologio kaj ĝeneralaj plantmalsanoj). Mi jam pridiskutis kun la Estraro de via Akademio pri Agrikulturo organizi seminarion por orienteŭropaj landoj pri la problemoj de sempatologio — eble en Prago, same kiel mi faris en Ĉinio.

Mi esperantiĝis kiel knabo — mi vidis libron pri Esperanto kaj kun granda intereso, obstine, aŭtodidakte mi ellernis la Internacian Lingvon kaj estigis ĝia arda adepto. En 1925 mi sola biciklis de Kopenhago al Genevo por partopreni la Universalan Kongreson kaj mi havis la plezuron konatiĝi kun eminentuloj de la E-movado kiel Edmond Privat kaj aliaj. Mi jam ne povas imagi mian vivon sen Esperanto.

— KIEL VI TAKSAS LA ORGANIZON DE ISEU EN VELIKO TARNOVO?

— En la mondo estas multaj kulturaj E-araĝoj, sed la vera kulturo bezonas spertajn prelegantojn. Tio ja donas altan aŭtoritaton al la arango kaj plialtigas la nivelon de Esperanto. Ni, kiuj venis el diversaj landoj, ni lernis multon pri Bulgario, kaj ankaŭ niaj bulgaraj samideanoj lernis ion de ni — tio estas ambaŭflanka kontribuo. Mi estas vizitinta pli ol 60 landojn kaj mi multon spertis el tiuj vojaĝoj. Mi ege ŝatas la bulgarojn — ili estas sinceraj, senperaj. Mi povas fari komparon, ĉar en nian instituton venis homoj el multaj landoj. Oni ne devus doni monopolon al kiu ajn lando, kaj per tio oni perfektigas kiel vera humanisto.

— ĈU VIN NE MALTRANKVILIGAS LA KREO DE ISEU EN PLIAJ LANDOJ?

— Tute ne! Oni ne devas redukti la disvastigon de iniciatoj. Mi tre fidas la valoron de la varieco — via ISEU povus internacie konkuri: per sia alta nivelo ĝi nur kontribuos al la E-movado. Mia opinio, estus pli bone, se ni havus 10 ISEU anstataŭ nur unu kun 100—200 partoprenantoj. La ekzisto de multaj iniciatoj povas nur stimuli la mondan esperantistaron, sed ĝia sukceso dependos de la kapabloj de ĝiaj organizantoj.

— ĈU LIMIGI AŬ PLIAMPLEKSIGI LA TEMARON DE LA PRELEGOJ?

— Unue ni devas trovi kaj inviti altkvalitajn spertajn prelegantojn, kiuj ne balbutas, sed perfekte posedas Esperanton. Estas malfacile fari nur la unuan aŭ nur la duan. Miaopinie, niaj arandoj devus simili al popolaj universitatoj. Jen por vi grava novaĵo — tute „freŝa”: la Parlamento de San Marino prenis decidon (laŭ la iniciato de prof. Helmar Frank el Paderborn kaj de lia itala kolego prof. Penaccietti), ke oni povu doktoriĝi en Esperanto en la tiel nomata Internacia Libera Akademio de Sciencoj. Mi estas membro de ties konsilantaro kaj intencas pledi, ke oni povu doktoriĝi ankaŭ pri miaj specialecoj — plantmalsanoj kaj certe — esperantologio.

— ESTAS KONATE, KE EN 1939 VI ORGANIZIS GRUPON DE SAT EN KOPENHAGO, KE VI SIMPATIAS AL LA LABORISTARO. KIEL VI RIGARDAS AL LA INTENCO DE USONO INSTALI NOVajn NUKLEAJN ARMILOJN EN OKCIDENTA EŬROPO?

— Mi estas entute kontraŭ la vetarmado. Mi opinias, ke ni devas batali por plibonigo de l'vivkondiĉoj de la homaro. Inter la du mondoj oni devas krei antaŭ ĉio fidon. En okcidenta Eŭropo mankas precizaj informoj pri la orienteŭropaj landoj. Estas ege grave, ke ni venu en la orientajn landojn. Ni devas interkonatiĝi kaj amikiĝi! Ni, esperantistoj, praktike agas por paco kaj amikeco inter la popoloj. Tion ni provas per niaj konkretaj agoj.

— ĈU VI POVUS BONDEZIRI ION AL NIAJ LEGANTOJ?

— Jes, plezure!

„Oni petas min — spontane — esprimi miajn sentojn, partoprenante nun la sukcesplenan Internacian Someran Esperanto-Universitaton en Veliko Târnovo. Kiel ĉiam antaŭe, mi trovis amikojn ankaŭ en Bulgario. Mi deziras pluan sukceson por la venontaj sesioj de ISEU kaj por la bulgara E-movado!”

Prof. d-ro PAUL NEERGAARD,
Danlando

D-ro Arpad Mathe:

„Surprize aktiva partopreno!...”



— KIEL VI TAKSAS LA INICIATON ORGANIZI POR LA UNUA FOJO EN BULGARIO INTERNACIAN SOMERAN ESPERANTO-UNIVERSITATON?

— Via iniciato estas tre aktuala. Jam estis tempo ankaŭ en Bulgario organizi Someran Esperanto-Universitaton. Vi elektis bonegan lokon por tiu ĉi internacia arando.

— KIEL, LAŬ VIA OPINIO, ESTIS ORGANIZITA TIU ĈI ARANGO KAJ KIAJN REKOMENDOJN VI POVUS FARI RILATE LA PROGRAMON POR LA ESTONTO? (KONSIDERANTE LA EKZISTON DE SIMILA ARANGO EN GYULA, HUNGARIO?)

— Lokon, temojn vi bonege elektis, vi sukcesis varbi por prelegoj ambaŭ vicprezidantojn de la Akademio de Esperanto, la lokaj instancoj brile apogis vian iniciaton, do vi povas kalkuli je granda sukceso ankaŭ en la estonto. Sed, estu permesate al mi atentigi vin pri la pli frua kaj pli vasta informado internaciskala pri via ISEU. Krome, estas necese anticipe priparoli la temojn de la prelegoj kun organizantoj de aliaj, similtemaj E-arandoj.

— KIA ESTIS LA INTERESO AL TIU ĈI ARANGO?

— Surprize aktivaj estis la partoprenantoj. Ekzemple, al la jaŭda prelego de prof. Neergaard (ĝi temis pri evoluo de Esperanto) alparolis kaj metis demandojn 12 personoj. Saĝnas al mi, ke nia aktivularo tre bezonas similajn eblecojn por publika diskuto pri sciencaj kaj popolarsciencaj temoj.

— ĈU VI DENOVE PARTOPRENUS TIUN ĈI ISEU? PER KIUJ TEMOJ?

— Tre volonte. Krom kemia temo, mi prezentus ankaŭ prelegon pri ĝenerala faka terminologio de Esperanto.

Veliko Târnovo —
Sofio, julio 1983

Intervjuis: DONČO ĤITROV

INTERNACIA VIRINA SEMINARIO

EN PISANICA

Dum la pasinta UK en Antverpeno, Belgio, la Virina Komisiono de UEA decidis okazigi antaŭ la ĉi-jara UK en Budapeŝto unusemajnan internacian virinan seminarion en la Internacia E-Kursejo en Pisanica, Bulgario.

De la 20-a ĝis la 27-a de julio j. k. en la Esperanto-domo en Pisanica, distrikto de Smoljan, kunvenis 17 virinoj el kvin landoj: Usono, Italio, Hungario, GDR kaj Bulgario.

La prezidantino de la Bulgara Virina Komisiono ĉe BEA — samideanino Belka Beleva, bonvenigis la ĉeestantinojn kaj komunikis al ili la programon de la seminario.

S-ino Anna Brennan (Italio) — membro de la Virina Komisiono ĉe UEA, proponis la temaron. Ŝi speciale emfazis la ĉefan temon de la seminario: „Sperto de virinoj paroli publike“.

La ĉiutagajn kunsidojn gvidis la membroj de la Virina Komisiono ĉe UEA. Julie Tonkin el Usono (eksprezidantino de tiu sama komisiono), Anna Brennan, Vera Dehler (GDR) kaj Belka Beleva. Laŭ la difinita programo, en la limigita tempo de kvin minutoj, ĉiuj partoprenantinoj prelegis pri du temoj el la proponita temaro — unu elektita laŭdeziro, kaj la dua — deviga, proponita de la gvidantinoj de la seminario. Post prezento de la temoj okazis pridiskutado: oni priparolis ĉu la prelegantino (aŭ parolantino), parolante publike, sukcesis trafe prezenti la temon, kaj ĉu estis kontentiga ŝia lingva nivelo.

Oni povas diri, ke dank' al la eltrovemo kaj lerteco de s-inoj Tonkin kaj Brennan, la diskutado de la temoj similis al agrabla ludo. Laŭ ilia propono okazis jena tre interesa disputo: Ĉu Esperanto estiĝos internacia lingvo? La utilo de fumado? Ĉu estas utile eduki infanojn en la ideoj de Esperanto kaj instrui al ili la lingvon? La partoprenantinoj estis dividitaj en kelkajn pare lititajn triopojn. Ĉiu triopo, sen longa pripensado, prezentis iun el la temoj en pozitiva lumo, kaj la para triopo responde devis kontraŭstari, esprimi al la sama temo tute negativan rilaton, kompreneble, apogante siajn asertojn per solidaj argumentoj. Krome, okazis speco de „intervjuo“: pare dividitaj, la virinoj prezentis unu la alian antaŭ la ceteraj ĉeestantinoj kaj tiamaniere interkonatiĝis.

Ĉiutage posttagmeze okazis ekskursoj al la pitoreskaj ĉirkaŭaĵoj de Pisanica kaj Smoljan — al la fama feriejo „Pamporovo“, al vilaĝo

Siroka Lâka kun ĝia tipa rodopa arkitekturo, al la nova urbocentro de Smoljan.

Tre grava momento estis la renkontiĝo kun virinoj-sociagantinoj en Smoljan. Tiu renkontiĝo ebligis al la gastinoj konatiĝi kun la sukcesoj, kiujn atingis tiu ĉi bulgara regiono post la venko de la socialisma revolucio en nia lando kaj kun la rolo de virinoj en la ekonomia kaj politika vivo de la lando. En amika etoso, laŭ deziro de la dommastrinoj, ankaŭ la gastinoj rakontis pri si mem.



La partoprenantinoj en la virina renkontiĝo

La antaŭkongresa virina seminario en Pisanica pasis tre sukcese — la programo estis detale plenumita, kaj ĝi certe havos favoran influon sur la estonta laboro de la virinoj-esperantistinoj.

Finante mian raporton pri la Internacia Virina Seminario en Pisanica, mi ŝatus doni lokon al eldiro de Julie Tonkin, kiun ŝi faris post la fermo de la seminario—en Sofio, antaŭ la kunveno de sofiaj esperantistoj, kie ĉeestis ankaŭ prof. Paul Neergaard el Kopenhago kaj Carmel Mallia el Malto:

„En Pisanica venis ĉirkaŭ 20 virinoj. Ne estis sufiĉe da internacia etoso, tamen ni atingis amikan etoson. Via lando estas belega. La homoj freneziĝis pro la luksaj kondiĉoj. Kiel usonanino, mi rekomendas al vi, bulgaroj, se vi ankoraŭ ne faris tion, viziti Pisanica, kie mi mem denove plezure ferius.“

ZORA OŜANSKA

ESPERANTO KAJ LA SCIENC-TEKNIKA PROGRESO

Similan seminarion en Bulgario oni aranĝas por unua fojo. Ĝia sukceso kaj la esprimita vigla intereso al ĝi estas garantio pri ĝia plua ekzistado.

La organizantoj, sub la gvido de ing. Leonov, proponis varian, interesan, aktualan programon kaj agrablajn laborkondiĉojn. Partoprenis ĉirkaŭ 40 fakuloj-geesperantistoj, inter ili 17 eksterlandanoj el 8 landoj: Anglio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando, Sovetunio kaj Vjetnamio.

La solena malfermo okazis en Karlovo, la 2—5-an de junio j. k. en la salono de la Domo de Tekniko. La ĉeestantojn salutis la prezidanto de la Scienc-Teknikaj Societoj en la urbo kaj direktoro de la Domo de Tekniko k-do Tantilov. Li esprimis sian kontenteton pro la kunlaborado kun fakuloj-esperantistoj kaj subtenis la ideon pri peresperanta laboro kaj kunlaboro en la Centro pri Patenta Informado ĉe la Domo de Tekniko en Karlovo.

En la nomo de CE de BEA, ĝia vicprezidanto Petăr Todorov salutis partoprenantojn kaj dommastrojn, bondezirante sukceson al la seminario. „Ĝi estiĝu tradicia aranĝo — li diris, — kie la fakuloj ankaŭ per Esperanto kontribuu al la homa progreso, kiu, cetere, estas ĉefa linio por aktivado en kadre de UEAL“

Pro longa por- kaj peresperanta aktivado kaj meritoj al la monda esperantista movado, d-ro ing. H. J. Plehn el Aŭstrio estis distingita per la Honora Insigno de BEA kaj per diplomo, kiujn P. Todorov enmanigis al li.

Laŭprograme la seminario havis tri sekciojn:

— Scienc-teknika kaj patent-teknika informado

— Interlingvistikaj problemoj. Fakaj E-terminaroj

— Ekologiaj problemoj

La 14 sciencaj raportoj kaj sciigoj montris la seriozan preparadon de la partoprenintoj en la diversaj sekcioj de la seminario. La nivelo de la seminario grave plialtigis la du filmoj prezentitaj de s-ino Joye M. Copland el Anglio, traktantaj la solvendajn ekologiajn problemojn pri rubaĵoj kaj pri polucio de la riveroj. En la sama sekcio tre valoraj estis la raportoj de s-ro F. Molnar kaj s-ino A. Székely, de doc. Kardašev, prof. Marinov kaj de d-ro B. Mészáros.

Tre interesaj kaj utilaj estis la raportoj ankaŭ en la dua sekcio: „Omonimoj kaj la problemoj de la necesa precizeco“ — d-ro ing. H. J. Plehn, (Aŭst.) „Por faka instruado de Esperanto kaj ĝiaj specifaj aspektoj“ — ing. P. Hrdil Ĉeĥ.), „Terminologia agado en la Terminologia Sekcio de SEC — Budapeŝto“ — ing. Iván Bujdosó. (Hung.).

Tre gravaj principohavaj kaj informplenaj estis la raportoj de ing. B. Leonov, S. Mazura kaj s. k. Sentov pri patent-teknika informado pere de Esperanto.

La partoprenantoj atentigis la organizantojn pri la utileco de la seminario kaj proponis, ke ĝi estiĝu tradicia, kun aperigo de ĉiuj raportoj.

La ekskursita tago pliriĉigis la impresojn de la seminarianoj pri la bona organizo de la seminario en Karlovo.

P. T.

TRAJANA PETKOVA — HEROO DE LA SOCIALISMA LABORO

Ĉiuj, kiuj konas Trajana Petkova — veterano de la laborista kaj esperantista movado en Bulgario, renkontis kun granda ĝojo ŝian honorigon per la alta titolo „Heroo de Socialisma Laboro“ pro ŝia revolucia agado antaŭ la 9-a de septembro 1944, pro aktiva partopreno en la socialisma konstruado en nia patrolando post la liberigo el la faŝisma kaj kapitalisma jugo kaj lige kun ŝia 75-jariĝo.

Trajana Petkova plenmerite portas tiun titolon. Ŝia ĝisnuna vivo dividiĝas en du preskaŭ egalajn duonojn — dum la jaroj de kapitalisma tiraneco kaj kruela faŝisma diktaturo kaj post la popola venko je la Naŭa de Septembro 1944.

Mi konas Trajana jam de la tempo, kiam ŝi estis ĉarma junulino — ĉirkaŭ 1928—1929. Ŝia familio loĝis en unu el la proletaj kvarta-



loj de Sofio. La patro — elmigrinto el Makedonio — estis klaskonscia laborulo kaj ne miris, ke ankaŭ lia filino ekiris tiun vojon. Si aktive partoprenis la batalon de la laboruloj kaj oni komisiis al ŝi ĉiam pli respondecajn taskojn, kio multfoje povis kaŭzi al ŝi penigan morton en la manoj de la polico. Ja en la granda batalo de la laborista klaso pereis ŝia edzo, nia neforgesebla Anĝelo! Samaj vivdangeroj kaj riskoj minacis ankaŭ ŝin...

Miaj rememoroj venigas min al la komencaj jaroj de la laborista E-movado. Trajana Petkova estis aktivulino de la ĉefurba laborista E-societo.

Pro manko de rimedoj la kancelario kaj la sidejo de la Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA) kaj de la redakcioj de „Balkana Laboristo“, „Mejdunaroden Ezik“ kaj „Mejdunaroden Rabselkor“ troviĝis en la domo de nia bonega kamarado-esperantisto Simeon Petrov, sur str. „Sar Planina“ 56, en la proleta kvartalo „Konjovica“ de tiama Sofio. Konstanta vizitanto tie estiĝis Angel Petkov (Anĝelo). Li kaj Trajana konatiĝis kaj poste kreis junan proletan familion. Jam kune ili plu partoprenis la laboron de BuLEA, pro kio Anĝelo trafis en la malliberejon. Tamen nenio timigis Trajana — nek la oftaj arestoj, nek la persekutado fare de la polico. Si obstine kaj sindone staris sur sia proleta posteno.

Kaj tamen venis kruela bato por ŝi kaj por nia revolucia kaj esperantista movado. Tio okazis en 1941. Tiam estis arestitaj multaj respondecaj kamaradoj, inter kiuj Asen Grigorov kaj ŝia edzo Angel Petkov (Anĝelo). Rezulte de la inkvizicioj en la Direkcio de Polico la sano de Anĝelo tiom malboniĝis, ke oni translokiĝis lin en la malliberejan hospi-

talon. Tamen jam estis malfrue: la 13-an de junio 1941 Anĝelo mortis. Lia morto kaŭzis al Trajana pezegan suferon. Si perdis sian bonegan vivkunulon, la fidelan kaj sindonan al la revolucia kaj esperantista movado Anĝelo.

La terura bato tamen ne rompis la volon de Trajana kaj ne deŝiris ŝin de la laborista movado. Post la insida agreso de Hitler-Germanio, ĉiuj kontraŭfaŝistoj en nia lando mobilizis siajn fortojn por helpi al Sovetunio en la batalo kontraŭ la invadantoj.

Kvankam sola post la morto de Anĝelo, Trajana Petkova sekvis la partian alvokon kaj plu estis en la unuaj vicoj, riskante ĉiun momenton sian vivon.

La jubileulino havis la grandan feliĉon travivi, kune kun la tuta bulgara popolo, unu el la plej helaj tagoj en sia revolucia vivo. Dank' al la decidiga helpo de Sovetunio kaj ties glora Ruĝa Armeo nia lando forigis la jugon de la faŝismo kaj kapitalismo kaj ekiris la vojon de konstruado de nova, socialisma sociordo en nia patrolando. Ankaŭ en tiu ĉi nova sfero de agado Trajana Petkova estis inter la unuaj — ŝi estis oficigita kiel direktoro de novkonstruata elektrostacio en urbo Mezdra, kie demonstris siajn kvalitojn de organizanto kaj politika gvidanto.

Poste ŝi plenumis respondecajn funkciojn en la sindikatoj kaj samtempe partoprenis aktive la movadon de bulgaraj virinoj.

Trajana Petkova laboris ankaŭ en la renaskiĝinta E-movado en nia lando. Si estis elektata en la gvidorganoj de Bulgara Esperantista Asocio kaj fordonis sian tutan entuziasmon kaj sperton, hereditajn de la tempo de BuLEA, por nova supreniro de la movado de bulgaraj esperantistoj, por ke la Internacia Lingvo Esperanto estu metita je servo de la socialisma konstruado kaj de la pacama politiko de Bulgario. Si klarigis la karakteron de la novaj taskoj antaŭ la esperantistoj kaj klopodis unuigi ĉiujn E-generaciojn ĉirkaŭ la Patrolanda Fronto. Kaj kiam ankaŭ en nia lando oni alpaŝis al fondo de Komitato de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM), Trajana estis elektita kiel ĝia membro kaj kontribuis por mobilizo de la esperantistoj en defendo de la tutmonda paco, kontraŭ bruligo de nova milito fare de la imperiistoj.

Kvankam okupita pri sociagado en diversaj neesperantistaj organizaĵoj, Trajana Petkova ne ĉesis helpi laŭ siaj fortoj por la sukceso de ties iniciatoj. Tial ni merite honoras ŝin kiel veteranon de la bulgara E-movado, dediĉintan al ĝi siajn fortojn kaj kapablojn dum pli ol duonjarcento.

Honoron kaj gloron al ŝia persistado, kiu povas servi kiel ekzemplo al la pli junaj E-kadroj!

NIKOLA ALEKSIEV,
E-veterano

LA RESENDITA LETERO

Ni renkontiĝis en Hiroŝimo. Ĉu vi rememoras? La matena suno ĵus estis ekirinta laŭ sia majesta vojo. Ni ne konis unu la alian. Vi estis ricevinta mian telegramon por renkonti min en la stacidomo. Ni rekonis unu la alian laŭ la verdaj flagetoj kun presita sur ili esperanta emblemo, kiujn ni portis enmane. Vi akcelis viajn etajn paŝojn, multfoje riverencis kaj diris:

— Akiko. . .

Mi diris mian nomon kaj etendis la manon. Vi akceptis ĝin iel mallerte, singene. Tiel komenciĝis nia interkonatiĝo kaj la sola tago pasigita kune. Poste ni ekiris. Marŝante, vi rakontis al mi la historion de via urbo:

— Iam, en 1594 la feŭdestro Terumoto konstruis ĉe la delto de Rivero Ota fortikaĵon. Li nomis ĝin „Fortikaĵo de la Vasta Insulo“. Dum kvar jarcentoj tiu fortikaĵo transformiĝis en grandan urbon kaj kun siaj 400 000 loĝantoj ĝi okupis kvaran lokon en Japanio laŭ la nombro de loĝantoj. La maro invadas en la urbon tra sep kanaloj. Ili estas tre belaj. Sur ili navigas boatoj, sin banas infanoj, fiŝistoj kaptas fiŝon. . . Tiel estis, kiam de la Mariana Arkipelago, de insulo Tanian, alflugis malamikaj aviadiloj. Estis mateno, plena de suno. . . mateno plena de gaja infana parolbruo. . . mateno ruinigita de la mortiga atombombo, kiu senigis je vivo pli ol 200 000 senkulpajn loĝantojn de Hiroŝimo. Tio estis mateno, kiu ne povus esti forviŝita el la memoro de la restintaj vivaj, nek ĝi povus esti pardonita aŭ forgesita. . . Vera infero. . .

Mi aŭskultis vin atente. Mi pensis en la momento pri tiu terura tago, pri la 6-a de aŭgusto 1945. Tiam vi estis en la aĝo de sep jaroj kaj vi brulis kune kun via tuta familio en tiu ĉi infero. . . por ke vi restu sola. Mi image vidis vin — sidantan antaŭ via cindrigita loĝejo, plorante senvoĉe kaj ŝirante al vi la haŭton, pendantan kiel ĉifonoj desur via korpo, preskaŭ perdinte la konscion pro teruro.

Vi rakontis al mi ĉion travivitan, kaj mi en la momento pensis pri la knabineto Akiko, persekutanta papiliojn en la ĝardeno kaj kolektanta florojn por fari girlandon al sia pupo. Mi image vidis vin, kiel vi kreskas, lernas en diversaj lernejoj, loĝas en diversaj komunaj loĝejoj, kuŝas malsana en hospitalaj ĉambroj, turmentata de la insida radia malsano, de la orfeco, de sia soleco. . .

Ni haltis antaŭ la banka filio, kie sur la

muro ankoraŭ estis videblaj la postsignoj de homo, sidanta kun krucitaj kruroj, kun larĝ-periferia ĉapelo kaj kapo apogita sur la mano. En tiu ĉi pozo trafis lin la bombado. Li estis tuj malaperinta, sed lia postsigno restis por atendi, por rakonti. . . por memori. . . Antaŭ la ponto Djurudze ni ankau haltis. Tie, sur la restarigita parto, vidiĝis ankoraŭ la postsignoj de naŭ kunpremiĝintaj homoj en tiu sortodecida momento, kaj ili restis tiel por ĉiam. Tiuj homoj vivis iam, serĉis savon kaj malaperis en la momento mem, kiam okazis la eksplodo, lasinte nur siajn postsignojn.

En mia animo naskiĝis alarmo. La novaj belegaj konstruaĵoj de Hiroŝimo ne ĝojigis min. Mi vidis la iaman ruinigitan urbon, la tragikan eventon, kies atestanto estas vi, Akiko San. . .

Mi rimarkis surskribon „Atom Hospital“. Traduko ne estis necesa. Tie serĉas helpojn la suferantoj pro la radia malsano. Mi havis fortojn por trarigardi ĉion, tamen mi kompatis vin. Vi komprenis. Vi kaptis min je la mano kaj brave ekkondukis min.

— Ne maltrankviliĝu pri mi! Tio estas mia dua hejmo. Tie ĉi oni faris al mi ok operaciojn. Mi havas multajn geamikojn.

Vere estis. Oni bonvenigis nin kun granda amo kaj atento. Ni demetis al ni la ŝuojn en la koridoro. Tie ĉi kuŝis multaj ŝuoj. Parto de ili estis ŝuoj de malsanuloj, demetintaj ilin iam, por eniri kaj serĉi savon, tamen ili ne havis tempon por surmeti ilin denove iam. . .

En la unua ĉambro infaneto estis surgenu ĉe sia panjo kaj ploris mallaŭte. Du febraj, nigraj okuloj ekrigardis la kuraciston, kiu akompanis nin, sed ne rekonis lin. La infano ne ĉesis karesi la hararon kaj la vizaĝon de sia panjo. Alia malsanulino nerve gratis al si la dorson. La kuracisto demetis la noktoĉemizon. Antaŭ mia rigardo aperis la brulvundita haŭto, sulkiginta ĉe la resaniĝo, jen blanka, jen blukolora. Maldikiĝinta, tirstreĉita kiel tamburo, ĝi jukis ŝin terure. La malsanulino treege suferis pro tio.

Multaj ĉambroj, plenplenaj de pacientoj. Iuj el ili pro doloro histerie kriis kaj ridis, multloke aŭdiĝis infanaj plorkrioj kaj parolbruo. Estis malsanuloj, nem travivintaj la atombombadon kaj tiaj, naskitaj de gepatroj, kiuj travivis ĝin. En unu el la infanaj ĉambroj knabineto provis kapti per spegulo la sunra-

diojn kaj direktis ilin en la okulojn de alia infano.

— Ĉu vi tre ĝojas, kiam vi sukcesas kapti la sunon? — mi demandis.

— Jes! Ĝi estas belega! Se morgaŭ mi ne povos vidi ĝin, mi estos malfeliĉa. Kion ĝuste volis diri al mi tiu infano? Ĝi timis tiun „morgaŭ“, kiun ĝi eble ne ĝisvivos!...

Ni disiĝis kun la kuracisto. Ni direktis nin al la Muzeo de la Atomo aŭ la „Muzeo de la Sufero“, kiel nomas ĝin ordinare la japanoj. Kara Akiko, tiam vi kuraĝe marŝis apud mi...

— Viziti Hiroŝimon kaj ne trarigardi la „Muzeon de la Sufero“ signifus, ke vi nenion vidis...

La konstruaĵo estis belega. Ni eniris grandan lumplenan koridoron. Sur la muroj estis kroĉitaj la portretoj de Pierre kaj Marie Curie, de la Leibniz, Einstein kaj aliaj fizikistoj. De ie sonis la senmorta simfonio de Beethoven. La vizitantoj staris en la koridoro kaj atendis ion. Sur la alia muro estis pentrita grandega nigra fungo. La muziko ĉesis. Ni eniris la salanon. Oni mallumigis ĝin. Aŭdiĝis hurlado de sirenoj... zumado de aviadiloj kaj terura tondro ekskuis la konstruaĵon. Kvazaŭ la ĉielo fendigis. Sur la muro komenciĝis projekciado de filmo. Filmo pri la atombombado super Hiroŝimo. Iu bravulo sukcesis eternigi ĝin. Antaŭ nia rigardo kuradis nigraj figuroj de homoj, similaj al fantomoj. Infanoj brulis kiel torĉoj. Iliaj hararoj malaperadis en unu momento, kaj la haŭto de iliaj korpoj ekpendis kiel ĉifonoj. Tremante, mi ne povis elteni la vidaĵon, kiel la homoj sin ĵetis en la kanalojn, kie la akvo bolis kaj tie ili trovis tuj la morton, sed ne savon... Ni eliris kaj ekiris al la aliaj koridoroj. Kvazaŭ en sonĝo mi trarigardis la karbiĝintajn homajn korpojn, la fanditan virton, la pecetojn da ŝtofo, surŝprucigitajn per sango...

Ĉu mi ofendis vin per mia rifuzo rigardi plu tiujn teruraĵojn? Kiam ni eliris, mi profunde enspiris la puran aeron. Ni ekiris al la „Parko de la Paco“. Malgranda rondforma ĝardeneto. En la mezo — monumento de patrino, protektanta siajn du infanojn. Poste ni proksimiĝis al la monumento „Infanoj de la atombombo“. Tio estis la sola monumento, konstruigita de infanoj per iliaj propraj rimedoj, memore al la infanoj pereintaj de la atombombo. Sur la tri kolonoj staris Tejko Szaki kaj tenis enmane neforflugintan grupon. Surskribo: „Tio estas nia deziro, nia preĝo, ke en la mondo estu ĉiam paco!“ Tiu surskribo preskaŭ sufokis min. Ni surmetis florojn kaj direktis nin al la ŝtona sarkofago kun surskribo: „Dormu en paco! Neniam plu Hiroŝimo!“ Multaj kajeroj estis konservitaj tie. En unu el ili vi montris al mi kelkajn liniojn. Tio estis la nomoj de viaj parencoj kaj proksimuloj, pereintaj pro la radia malsano...

La suno jam komencis subiri. Lacigitaj, ni

ekiris denove al la stacidomo de Hiroŝimo. Ĉagrenitaj ni estis. Ĉiam, kiam homoj intervidiĝas por la lasta fojo kaj disiĝas por intervidiĝi neniam, ili estas malĝojaj. Sur la kajo vi skribis vian novan adreson kaj donis ĝin al mi. Mi ankaŭ donis al vi la mian, kvankam vi sciis ĝin. En tiu momento vi ekrigardis min kaj diris:

— Mi skribos al vi regule. Ĉiu via letero estos granda ĝojo por mi. Se tamen venos tago, kiam vi ne plu ricevos de mi leterojn, ne ĉagreniĝu! Por mi kaj por la ceteraj malsanuloj de la radia malsano la vivo prezentas unu grandan magazenon kun multaj standoj. Ni, la pacientoj, staras antaŭ la stando „Sano“, atendante medikamentojn por plibonigo de nia stato... daŭrigon de la vivo... La manko de mia respondo signifos, ke mi ne povis ĝisatendi mian bonŝancon, ke ne plu estas inter la vivaj. Tiam ne ploru pri mi! Memoru, ke mi neniam estis malfeliĉa. Ĉiam mi renkontis ĝoje ĉiun venantan tagon kaj adiaŭis ĝin kun danko, ke mi travivis ĝin. Mi vivis sufiĉe por disdonadi amon al la ĉirkaŭantaj min homoj kaj ricevi similan de ili. Kvankam kun brulvunditaj korpo kaj kruroj, malsana je la radia malsano, mi ĉiam estis feliĉa, ĉar mi restis viva...

— — — — —

Tio estis viaj lastaj vortoj ĉe nia disiĝo. La trajno ekveturis. Vi restis sur la kajo, svingante per la naztuketo. Post momento vi similis al malgranda punkto, kiu baldaŭ malaperis.

Hodiaŭ mia letero al vi estis resendita al mi nemalfermita. Sur la koverto estis nekonataj por mi signoj el la japana alfabeto. Certe, tio signifas, ke vi ne plu estas viva. Kредu al mi, mi ne ploras. Mi nur malfermis la koverton kaj denove tralegis mian leteron al vi. Se vi estus viva, vi demandus min kial ĝuste tian leteron mi skribis. Kial mi rakontas al vi pri mia unua kaj lasta renkontiĝo kun vi kaj pri tio, kion mi vidis. Mi faris tion intence. Mi volis ke vi sciu, ke malgraŭ la multaj jaroj, kiuj pasis de tiam, mi nenion forgesis, ĉio restis en mia memoro.

Mi ĉiam rakontos ĉion viditan tie. Mi bedaŭras nur, ke vi ne ĝisvivis la tempon, kiam niaj du landoj estiĝis amikoj. Tiom multe mi volus, ke vi gastu al mi... Vi ne ĝisatendis mian leteron, sed sciu, ke por mi vi ne estas morta. Vi vivas en ĉiu hazarde renkontita japanino, en ĉiu virino en la mondo, kiu agas por defendo de la paco, por ĉesigo de la nuklea armado, kontraŭ nova milito, por libera serena ĉielo kaj amikeco de ĉiuj homoj sur nia planedo...

PRI NIA IDEOLOGIA KAJ EDUKA LABORO

Eble por unua fojo la plenkunsido de la Urba Estraro de BEA en Sofio, okazinta la 14-an de julio j. k., traktis tiom profunde kaj zorgeme unu el la fundamentaj problemoj, ligitaj kun nia ĉiutaga E-aktivado — la problemon pri la ideologia kaj eduka laboro inter la sofiaj esperantistoj.

En la baza raporto, farita de Haim Levi — vicprezidanto de la Urba Estraro de BEA, estis pritaksitaj la atingoj de la novefonditaj regionaj societoj en la ĉefurbo, ilia ideologia, propaganda kaj eduka laboro por formado de alta civitana konscio ĉe la apartaj membroj de la E-societoj. Estis speciale substrekte, ke la sofiaj geesperantistoj devas viciĝi inter la plej aktivaj kaj ardaĵ propagandantoj de la atingoj de nia socialisma socio — enlande kaj eksterlande. Kiel ĉiam ili devas esti en la unuaj vicoj de la pabatalantoj.

Substrekte tiujn plej gravajn taskojn, Haim Levi menciis la personan kontribuon de la konstantaj kunlaborantoj de la Urba Estraro de BEA Zora Oŝanska, Hristo Gelebov, Maria Angelova, Bistra Dojĉinova, Libertaria Mladenova k.a. La raportanto speciale pritraktis la realigon de unu el la plej gravaj aranĝoj de la Urba Estraro — la Tagoj de la Esperanta Kulturo — Sofio'83. Li ankaŭ menciis iujn negativajn momentojn ĉe la efektivigo de la riĉa kultura programo, speciale subst-

rekante, ke tiu grava evento ne estis inde prezentita de la amaskomunikiloj — gazetaro, radio kaj televido.

La raporto de Haim Levi, samkiel la raporto de Zora Oŝanska (pri la instrulaboro en la sofiaj E-societoj) disponigis abundan materialon por diskutado kaj por valoraj eldiroj fare de la ĉeestantoj.

Pri la neceso de pli vigla kaj rezultodona propagando de Esperanto kaj de niaj E-aranĝoj enlande kaj eksterlande, de pli variaj propagandaj formoj kaj varbado de novaj membroj de niaj societoj kaj pri la instruado de Esperanto parolis d-ro Balĉev, Zahari Ivanov, Donĉo Hitrov, Georgi Dolapĉiev, Miĥail Ĉobanov, Conka Hristova k.a.

La partoprenintoj en la plenkunsido unuanime aprobis la raportojn, la projektodecidojn kaj la budĝeton, proponitan de Hristo Kanev — prezidanto de la UE de BEA.

Estis elektitaj novaj membroj de la Urba Estraro: Libertaria Mladenova, Ani Sotirova, Ljubomir Miĥajlov kaj Rajna Konstantinova.

La plenkunsido de la Urba Estraro de BEA en Sofio per siaj konkretaj decidoj nepre kontribuos por plibonigo de la ideologia kaj eduka laboro de la sofiaj esperantistoj kaj por pli fruktodona propaganda agado en ĉiuj sferoj de la socia vivo.

D. S. Ĥ.

Juna esperantisto

NIA ĈEĤA AMIKINO

PAVLA JODASOVA

Si alvenis en Vraca rekte el Prago, ne dorminte tri noktojn, tamen ĝoja, ekscitita, ĉar ŝi jam estis en esperanta medio, inter amikoj. Dum la tagoj de la Konkurso-Recitalo de Botev-Poezio en Vraca kaj dum la Internacia E-Renkontigo de Humuro kaj Satiro en Gabrovo ŝi havis sufiĉe da tempo por interparoli kaj interkonatiĝi.

— Rakontu ion pri vi, Pavla!

— Mi estas 17-jara lernantino en 11-a kla-

so de unu el la gimnazioj en Prago kun instruado de fremdaj lingvoj.

— Ekde kiam vi lernas Esperanton?

— Mi estis 11-jara, kiam por unua fojo mi aŭdis pri Esperanto. Mi vigle ekinteresiĝis kaj havigis al mi lernolibron por komencantoj. Eksciinte, pri kio mi okupiĝas, miaj gepatroj estis malagrabla surprizitaj. Tamen por mi Esperanto estis alloga kaj mi lernis ĝin obstine.



Decida momento estis mia partopreno en la sama E-tendaro en Lančov, kie mi pliriĝis miajn lingvokonajn. Iun tagon la instruistino de la antaŭlernea kurso por buboj malŝanĝis kaj forveturis al Prago, petinte min okupiĝi pri la instruado de la etuloj. Mi estis ege surprizita kaj pro ekscitiĝo ne povis dormi dum la tuta nokto, pensante kiamaniere mi devus instrui Esperanton al la buboj. Sajne mi ion elpensis, ĉar la sekvantan tagon mi kaj la etuloj satludis kaj samtempe ellernis multajn novajn Esperantajn vortojn. Tiel mi daŭrigis la instruadon — kvazaŭ ludante. La rezulto estis bonega! Guste tiam subite venis en mian kapon la ideo verki lernolibron por instruado de Esperanto al diversaj kursanoj. Nun la afero estas sufiĉe progresinta, sed mi devas konfesi, ke se oni vidus mian projekton, neniam konjektus, ke temas ne pri lernolibro — tiom stranga ĝi estas!...

Ignorante la malaprobon de miaj gepartoj, mi plu okupiĝis pri Esperanto. En la modesta klubo de nia E-societo en Prago estas konsiderinde riĉa biblioteko kun esperantaj el la tuta mondo, sed neniu okupiĝis pri ĝi. Iun tagon mi malŝlosis la bibliotekon kaj komencis ordigi ĝin, preparante katalogojn. Tiel mi malkovris veran trezoron!

Mi estas membro de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj vicprezidantino-kasistino de la Junulara E-Klubo en Prago, kiu nombras ĉirkaŭ 20 membrojn. Prezidanto de la klubo estas inĝ. Jan Pečený — ege agema kaj iniciatema samideano. Verdire, ni ne havas strikte difinitan agadplanon. En niaj regulaj kunvenoj ni okupiĝas pri muziko, lernas popularajn E-kantojn, tradukojn de originalaj literaturajoj de mondfamaj aŭtoroj, E-verkaron ktp.

Fakte en Ĉeĥoslovakio Esperanto estas mal multe populara. Necesas obstina kaj larĝskala propaganda laboro, por ke ni diskonigu ĝin inter la popolamasoj, inter la laboristaro, en la medioj de lernantoj, studentoj, sciencaj institucioj ktp.

Mi rememoras kiel mi enkuris iun tagon la oficejon de la prezidanto de l'Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto en Prago kaj elpafis mian demandon: „Ĉu vi scias, kio estas Esperanto?“ Vi povas imagi la miron de tiu kamarado, al kiu dekkvinjara knabino sin turnas tiel kuraĝe kaj impete! Post duonhora interparolo evidentiĝis, ke li rilatas tre favore al Esperanto, ke li bone komprenas ĝian gravan signifon kaj aprobis mian projekton, ke en la Unuamaja manifestacio sin prezentu ankaŭ geesperantistoj el nia societo kun verdstelaj flagoj kaj sloganoj en Esperanto!... Al mi ĉio ĉi nun ŝajnas ridinda, sed tiam mi tiom arde defendis mian ideon, ke eĉ ne sukcesis rimarki la kaŝitan rideton de la respondeca personeco. Tamen ni manifestaciis!...

Se vi preterpasus la vitrinon de nia E-klubejo, vi rimarkus, ke ĉiam kolektiĝas homoj, kiuj atente rigardas la televidan ekranon, sur kiu aperas diversaj informoj pri Esperanto. Helpe de komputilo ni respondas al starigitaj demandoj de interesitoj pri la Internacia Lingvo. Jen estas interesa formo por propagandi Esperanton, ĉu ne?

— Ĉu vi opinias, ke iun tagon vi povos apliki Esperanton en viaj praktikaj okupoj, t.e. profesie?

— Tion mi ne povas diri. Mi intencas studi lingvistikon en la Universitato kaj ligi Esperanton kun miaj studokupoj. Mi ŝatus verki ion pri Esperanto kaj ankaŭ — en Esperanto. Tion, kion mi vidis en Vraca kaj en Gabrovo, por la nuna momento ĉe niaj kondiĉoj estas neimagebla! Naciaj revuoj de E-kantoj kaj parolo, konkursoj-recitaloj de revolucia poezio en Esperanto, Tagoj de Esperanta Humuro kaj Satiro kaj ĉio ĉi sub la aŭspicio de partiaj kaj ŝtataj institucioj — tio ne efektiviĝos baldaŭ en nia lando. Nin atendas obstina laboro! Mi revenas Ĉeĥoslovakion plena de impresoj — tiom multe da renkontiĝoj, konatiĝoj kun bulgaraj esperantistoj, amikaj interparoloj, invitoj por gastado en privataj domoj... Mi tion ne forgesos kaj mi rakontos en detaloj al miaj kamaradoj pri ĉio vidita kaj travivita. Vi povas fieri pri la atingoj de via E-movado! Mi nepre revenos en vian ĉarmegan landon por ree esti en via amika, korvarma Esperanta medio.

Koran dankon pro via gastamo kaj afableco!

Intervjuis: D. SIMEONOV

**La abonkampanjo por 1984
komenciĝis!**

**Tuj abonu nian ŝatatan
revuon „Bulgara Esperantisto“!**

**Ĉiu membro de BEA — abonanto
de „Bulgara Esperantisto“!**

Karaj legantoj, kursgvidantoj kaj E-akti-
vuloj!

La redakcianoj kaj ĉiuj kunlaborantoj de
„Bulgara Esperantisto“ faras ĉion eblan por
plibonigo de la revuo. Niaj klopodoj celas
atingi kaj eĉ superi la nivelon de la plej bonaj
kaj aŭtoritataj E-periodaĵoj.

„BULGARA ESPERANTISTO“ strebas aparti-
tigi pli da loko por literaturaj materialoj —
origine verkitaĵoj en Esperanto aŭ tradukitaĵoj
el la bulgara lingvo, regule respegulas la en-
landajn kaj eksterlandajn E-eventojn, plezure
disponigas sur siaj paĝoj lokon por la materialoj
de siaj enlandaj kaj eksterlandaj gekorespondan-
toj, ĉiamaniere kontribuas por evoluo de la inter-
nacia amikeco, por interkompreniĝo de la
popoloj pere de Esperanto, por eterna kaj ne-
rompebla paco sur nia planedo.

„BULGARA ESPERANTISTO“ serĉas rek-
tajn kontaktojn kaj konstante plimultigas la
nombron de siaj alilandaj amikoj kaj perantoj,
kiuj nun aktivis en 18 landoj.

Bedaŭrinde, lastatempe niaj penadoj, en
certa senco, ŝajnas vanaj, ĉar ne ĉiuj distrik-
taj societaj kaj klubaj estraroj, E-aktivuloj
kaj kursgvidantoj faras la necesan propagan-
dan laboron por disvastigo de „BULGARA
ESPERANTISTO“.

Ni alvokas ĉiujn distriktajn kaj societajn
estrarojn de BEA, ĉiujn E-aktivulojn, kurs-
gvidantojn kaj helpemajn alilandajn amikojn

kaj perantojn senprokraste komenci pli vastan,
ĝustatempan varbadon de abonatoj por nia
belaspekta kaj enhavoriĉa revuo „BULGARA
ESPERANTISTO“.

Ni speciale turnas nin al la E-instruistoj en
la lernejoj varbi pli multajn abonantojn al
„BULGARA ESPERANTISTO“ ol pasintjare
inter la ĝelernantoj kaj siaj kolegoj. Sendube,
tiu agado efikos favore por plijunigo de niaj
vicoj.

Ne forgesu ankaŭ viajn eksterlandajn leter-
amikojn — nepre abonu „BE“ ankaŭ por ili!
La bulgaroj bonvolu fari sian abonon per
REP (Ŝtata Entrepreno por Disvastigo de la
Gazetaro), kaj la alilandanoj — per niaj pe-
rantoj en la koncerna lando, aŭ sendante la
abonsumon per ĉeko al la adreso de la redak-
cio: BG-1303 Sofio, bul. Ĥristo Botev 97, Bul-
gario.

Abonprezo: por Bulgario — 2,90 levoj, por
socialismaj landoj — 5,42 levoj kaj por ne
socialismaj landoj — 5,90 levoj (5 usonaj do-
laroj aŭ egalvaloro en nacia valuto).

Niaj enlandaj perantoj-volontuloj ne for-
gesu, ke ili rajtas ĝui 3%-an rabaton fare de
REP!

La abonkampanjo por 1984 jam komenciĝis
kaj daŭros ĝis la 10-a de decembro j. k. Suk-
cesan laboron, amikoj de „Bulgara Esperan-
tisto“!

LA REDAKCIO

25-JARA JUBILEO DE LA BLINDULA E-SOCIETO „LUMO“ EN PLOVDIV

La 4-an de junio j. k. en la kulturdomo de
entrepreno „Uspeĥ“ („Sukceso“) oni solene fes-
tis la 25-jaran jubileon de E-societo „Lumo“,
kies membroj estas blindaj esperantistoj.
Venis multaj esperantistoj por esprimi
sian estimon al la atingoj de la blindaj espe-
rantistoj dum la kvaronjarcenta periodo. Cees-

tis la prezidanto de la Distrikta Estraro de
BEA en Plovdiv Jordan Angelov — membro
de CE de BEA, la prezidanto de E-komisiono
ĉe la Centra Konsilantaro de la Asocio de
Blinduloj en Bulgario Todor Soŝev, reprezen-
tanoj de E-societo „Kulturo“ en Plovdiv kaj
de la E-societoj de blinduloj en Sofio kaj
Varna.

La solenaĵon malfermis la vicprezidanto de DE de BEA en Plovdiv Vladimir Jelev, membro de CE de BEA. En sia parolado li substrekiis, ke „Lumo“ ĉiam strebis disvolvi aktivan agadon kaj partopreni en ĉiujn aranĝojn, organizatajn de BEA.

Malfacila kaj peniga estis la vojo de la blindaj esperantistoj en Bulgario. Nur kelkajn jarojn post la fondo de „Instituto por blinduloj“ en 1905, inter la edukatoj oni ekparolis pri Esperanto. Disvastiganto de la internacia lingvo inter blinduloj estiĝis Nikola Torbev. En 1914 estis fondita la unua E-societo de blinduloj en Bulgario.

Tre gravaj por la evoluo de la E-movado inter blinduloj estis la E-kursoj, organizataj en la Instituto por Blinduloj dum la periodo 1921—1944. Instruistoj estis la konata bulgara esperantisto Asen Grigorov kaj lia blinda kolego Dimo Kolev. La unuan kurson gvidis Panajot Kolev. Sub lia gvidado estas eldonitaj „Esperanta-bulgara vortaro“ laŭ la Brajla metodo kaj „Esperanta gramatiko“, kies aŭtoro estas li mem.

Fondinto de E-societo „Lumo“ estas la 89-jara Damjan Pacev, kiu ankaŭ nun estas ĝia aktiva membro. La unua E-kurso por blinduloj okazis en 1957 sub la gvidado de Ivan Bataklijev. En 1958 ĉe societo „Kulturo“ estas fondita blindula E-grupo kun prezidanto Damjan Pacev. Iom post iom la nombro de la dezirantoj lerni Esperanton kreskis, la grupo stabiligis kaj en 1962 apartiĝis kiel memstara societo.

Nun E-societo „Lumo“ distingiĝas per sia riĉa kaj varia agado. Dum mallonga tempo oni kreis amatoran kantensemblon kun gvidantino Veliĉka Karparova. Ĝi gajnis unuan premion de la Nacia Revuo de E-parolo kaj Kanto en Kazanlâk 1983. Jam ekde 1960 la societaj membroj aktive partoprenas seminariojn, konferencojn kaj kongresojn de BEA, literaturajn

konkursojn kaj festivalojn. Iuj el ili kiel Danĉo Danĉev, Stefka Sirakova, Veliĉka Karparova kaj Donka Bajkova gajnis unuajn kaj duajn premiojn. En 1982 Danĉo Danĉev estas distingita en la konkurso por originala kaj traduka literaturo en Loveĉ per la speciala premio de la ĵurio pro lia versaĵo „Senmorteco“.

Preskaŭ ĉiuj membroj de E-societo „Lumo“ korespondas kun siaj amikoj el diversaj partoj de la mondo. Dank' al la daŭraj amikaj rilatoj inter esperantistoj el Plovdiv kaj Kislovodsk (USSR), oni organizas reciproke gastadon de grupoj por interŝanĝo de sperto el entrepreno „Uspeh — Plovdiv kaj la instru-produktada entrepreno en Kislovodsk. Iuj el la societaj membroj regule kunlaboras al bulgaraj kaj internaciaj E-gazetoj en brajla skribo.

En la nomo de CE de BEA J. Angelov dekoris Vladimir Jelev per la Arĝenta Insigno de BEA pro liaj grandaj meritoj por disvolvo de Esperanto inter la blinduloj en Plovdiv. Per diplomoj estis distingitaj ĉiuj membroj de la estraro de E-societo „Lumo“ kaj la membroj de la revizia komisiono. Donacojn ricevis la fondintoj kaj aktivuloj de la societo.

Pro sia fervora kaj utila agado la jubileanta societo ricevis multajn florojn kaj gratulelegramojn de la Centra Estraro de la Asocio de Blinduloj en Bulgario kaj de E-societoj el Bulgario kaj Sovetunio.

Post la solena parto estis prezentita riĉa literatura-muzika programo. Ĝin partoprenis ne nur amatoroj el societo „Lumo“, sed ankaŭ blindaj esperantistoj el „Balkana Stelo“ — Sofio kaj „Espero“ — Varna. En la programo partoprenis la konata duo „Espero“ — pianistino Mariana Ikonomova kaj violonisto Petăr Atanasov. Ilia plenumo faris bonegan impreson al la publiko.

TANJA JOVEVA

MALFERMITA LETERO

Estimataj gesamideanoj, karaj geamikoj!
Fine de junio j. k. en Sofio okazis letervespero, organizita de la Sofia Centro por E-Kulturo „M. Gorkij“.

Kiel blankaj kolomboj alflugis el diversaj landoj leteroj kaj bildkartoj kun sinceraj, varmaj salutvortoj kaj bondeziroj. Blankaj kolomboj de vera, sincera amikeco! Sendis ilin homoj diversaj laŭ aĝo, sekso, profesio, nacieco kaj pensmaniero. Venis salutoj de apartaj personoj, ankaŭ bildkartoj, subskribitaj de kelkaj esperantistoj.

Karaj geamikoj! Per viaj leteroj vi multe

helpis, por ke nia letervespero estu pli interesa. Ni konigis la enhavon de viaj leteroj. Pere de loterio ni disdonis viajn adresojn. Baldaŭ vi ĉiuj, kiuj skribis al ni, ricevos respondon de viaj novaj bulgaraj amikoj. Ni aranĝis malgrandan ekspozicion el viaj sendaĵoj. Poste ni ordigos ilin en speciala albumo.

En la nomo de Urba Estraro de BEA kaj de la Sofia Centro de E-Kulturo „M. Gorkij“, ni volus esprimi sinceran dankon pro via afableco respondi al ni kaj tiel subteni nian iniciaton! Ni ĉiuj sentis vian ĉeeston en la letervespero, viaj leteroj kortuŝis nin! Multaj



Foto: Koljo Markov

el vi skribis, ke ili jam konas nian landon, aliaj esprimis deziron veni por konatiĝi kun nia modesta, sed gastama popolo. Skribis al ni pacbatalantoj. La ideo pri paco estas profunde en iliaj animoj — la vortoj „paco, amikeco“ en la letero de franca amiko estis skribitaj per grandaj literoj. Sajnas, ke tiuj vortoj estas sanktaj por ili!

„La internacia korespondado malfermas antaŭ la esperantistoj la tutan mondon kaj krome, kontribuas por interkompreniĝo de la popoloj“ — skribis al ni gesamideanoj el Rostock en komuna letero.

Ni kredas, ke la organizita de ni letervespero donos bonajn rezultojn. Certe kreiĝos leterrilatoj, kaj amikeco, kreita pere de korespondado ofte lasas en la homa vivo profundajn spurojn.

Ni organizos ankaŭ aliajn letervesperojn, kies ĉefa celo estos propagando de la Internacia Lingvo kaj kreo de vera amikeco inter homoj diversnaciaj.

Kaj ni ne dubas, ke vi denove helpos nin!

LILIJA KOLEVA

E-RENKONTIGO EN SUDOKCIDENTA BULGARIO

Ankaŭ ĉi-jare la 18-an kaj 19-an de junio en Samokov okazis la tradicia E-Renkontiĝo de Esperantistoj el Samokov kaj el Sudokcidenta Bulgario. Fakte ĝi transformiĝis en internacian aranĝon, ĉar partoprenis ankaŭ 2 esperantistoj el GDR kaj 8 el Hungario. La Renkontiĝo estis dediĉita al la 60-jara jubileo de la glora Septembra Ribelo en 1923 kaj al la pacbatalo.

En solena kunveno la ĉeestantoj kun granda intereso aŭskultis la raporton de Nano Kjuĉukov, vicprezidanto de CE de BEA, dediĉitan al la Septembra Ribelo 1923 kaj al la partopreno en ĝi de multaj esperantistoj. La raportanto emfazis la eksterordinaran gravecon de la batalo por malarmado mondscale kaj la

aktivan partoprenon en ĝi de la esperantistoj en Bulgario kaj en eksterlando.

La kunveno akceptis tekston de gratulotelegrafo al la Asembleo por Paco kaj Vivo en Prago.

Sekvis altnivela literatura-muzika programo kun la partopreno de lernejana ĥoro de lernejo „Samokovska Komuna“, lernejana E-grupo el lernejo „Boris Haĝisotirov“ kaj la mandolina orkestro de la Sindikata Domo en Samokov.

Post la kunveno oni metis florkronon ĉe la Komuna Tombo de la pereintoj en la Septembra Ribelo 1923 kaj en la kontraŭfaŝisma batalo. Okazis renkontiĝo de la gastoj-esperantistoj el GDR kaj Hungario kun lokaj funkciuloj. La prezidanto de la Komunuma Komitato de la Patrolanda Fronto Todorov salutis la gastojn, enmanigis al ili donacojn kaj la emblemon de urbo Samokov.

La E-Renkontiĝo de Esperantistoj el Sudokcidenta Bulgario en Samokov finiĝis per amuza vespero en v. Mala Ĉarkva kaj per ekskurso.

ZAĤARI IVANOV

IESF — „BORIMA'83“

En la Balkanmontaro, inter urboj Loveĉ kaj Trojan (je la buslinio Loveĉ-Trojan) situas vilaĝo Borima. En la montara regiono, ĉirkaŭ 2 km for de Borima troviĝas la Esperanto-domo, kie la 1—10-an de julio okazis la VI Internacia E-Seminario-Feriado, dediĉita al la sesdeka datreveno de la Septembra Ribelo 1923.

Ĉiumatene, post la instruhoroj de Esperanto pri unua kaj dua gradoj, la gekursanoj havis eblecon promeni tra la pitoreska valo meze de sovaĝa arbaro, fari sunbanojn sur la strando de baraĝo „Sopot“, kolekti fungojn, frambojn kaj fragojn. La ĉiutagaj ekskursoj kaj ĉiuvesperaj amuzaranĝoj ne malhelpis la sukcesan lernadon de Esperanto — la kursgvidantoj kaj la prezidanto de la Organiza Komitato de la Seminario doktorino Tjuran Omer estis tre kontentaj. La plej lernemaj kursanoj estis distingitaj per premioj. Inter ili: Rumjana Cvetanova kaj Ljudmila Vergilova el Miĥajlovgrad kaj aliaj el Loveĉ, Sumen. Blagoevgrad ktp.

Pri la aranĝo respondecis DE de BEA en Loveĉ kaj la Mastruma Entrepeno „Esperanto“.

La prezidanto de DE de BEA en Loveĉ Coĉo Kolarov, ĉefo de la VI IESF „Borima'83“, informis ke dum la



Foto: Lasto Nikov

seminario „Ora Aŭtuno“ (1—10. 10. 83) la Internacia Esperanto-bazo en Borima funkcios per plena kapacito.

Malgraŭ ke mi ne havis eblecon partopreni ĉiujn arangojn de la VI IESF, mi estas kontenta, ke mi povis dum kelkaj tagoj spiri freŝan montaran aeron, esti en vera Esperanta etoso kaj havis okazon interparoli kun la prezidanto de E-societo „Nova Mondo“ en Borima Stojko Soŝkov kaj kun la konata instruisto de Esperanto Ivan Liŝev. Mi dankas al ĉiuj 22 partoprenintoj en IESF „Borima'83“ — de la plej juna — la 8-jara Steŝo Marinov, ĝis la 50-jara baj Petko Beŝev — prezidanto de Ekonomia Entrepeno „Esperanto“ en Loveĉ pro la honoro ekbruligi la tendaran fraĵon.

L. N.

UNUA „FESTO DE FRAGOJ“



Foto: Lasto Nikov

ĈU EKZISTAS „FRAGA VALO“? DISTRO, AMUZO AŬ PROFESIA INTERESO?

Tre agrable estas, ke la unua oficiala festo de E-societo „Fraga Valo“ en vilaĝo Dermanci, distrikto de Loveĉ, pasis kiel „Festo de fragoj“ (la societo estis fondita la 3-an de junio 1980 de geesperantistoj el la vilaĝoj Peŝterna, Lazar Stanevo, Dermanci — komunuma centro, Aglen kaj Beĵanovo, situantaj laŭ la fluo de rivero Vit). La feston partoprenis 42 junaj esperantistoj el Sofio, Pleven, Lukovit kaj Dermanci. Kaj ni esperas, ke venontjare la partoprenantoj estos kelkoble pli multaj. La kaŭzo estas tre simpla — ja oni pasigis du tagojn en intima E-etoso kaj krom la vespermango en luksa restoracio kun video-diskoteko, literatura programo, konkursoj, oni ĝuis ankaŭ freŝan aeron, kamparan silenton kaj bongustajn fragojn (vidu la foton!).

Ekde la venonta jaro la literatura-muzika konkurso kaj la konkurso pri „Miss Fragineto“ estos kun premioj. Ankaŭ nacia seminario pri kulturado de fragoj kaj internacia junulara laborbrigado estas diskutendaj.

La juneco de la membroj de societo „Fraga Valo“ promesas interesan kaj agrablan pasigon de la estontaj fragaj festoj en Dermanci.

LASTO NIKOV

NOVA ESPERANTO-SOCIETO

Laŭ iniciato de esperantistoj el u. Peŝtera, distrikto de Plovdiv, fine de junio j. k. en la urbo estis fondita E-societo.

La fondon kunvenon ĉeestis la vicprezidanto de DE de BEA en Plovdiv Vladimir Jelev kaj la membro de la Buroo de UK de BKP Kiril Nedelĉev.

La nova societo havas 12 membrojn. Ĝia prezidanto estas la malnova esperantisto Stojan Zlaĉev, aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo. La ĉeestantoj decidis doni al sia societo la nomon de la juna esperantisto-partizano el Perŝtica Apostol Zlaĉev, pereinta en la kontraŭfaŝisma batalo.

Ni bondeziras al la nova societo sukcesan agadon.

VLADIMIR JELEV

BULGARINO/1982

Karaj legantoj, ĉu vi jam havigis al vi la novan bel-aspektan kajoron de revuo „BULGARINO“/1982, kiu aperis fine de junio?

BULGARINO/1982 estas dediĉita al la 100-jariĝo de la granda filo de Bulgario Georgi Dimitrov. Al li estas dediĉitaj kelkaj artikoloj, kiuj prilumas multflanke lian agadon kaj lian personan vivon.

La ceteraj materialoj — kiel kutime, prezentas kaj pritraktas interesajn momentojn kaj problemojn el la vivo de la bulgara virino sur la fono de la ĝenerala prospero de socialisma Bulgario.

BULGARINO — jara eldono de la Komitato de Bulgaraj Virinoj. Aperas en Esperanto, hispana, angla, franca kaj germana lingvoj. Adreso de la redakcio: Bulgario, Sofio, bul. Patriarĥ Evtimij 82. Por la E-eldono: bul. Ĥr. Botev 97.

Ni recenzas

DU BULGARROJ KANTAS EN ESPERANTO

Sub titolo „Du bulgaroj kantas en Esperanto“, la firmao „Balkanton“ en sia nova gramofondisko prezentas riĉan programon de du el la plej eminentaj bulgaraj kantistoj-esperantistoj: Maria Angelova — soprano, kaj Dimităr Denĉev — tenoro.

Desur la koncertaj podioj en Sovetunio, Italio, Hungario, Anglio, Danlando, Svedio kaj multaj aliaj landoj en Eŭropo sonis la milda, varma, kulturita kaj bone kontrolata voĉo de Maria Angelova — favoratino de la Esperanta publiko. Si kombinas la akademian kul-



DU BULGAROJ KANTAS EN ESPERANTO

Maria Angelova soprano
Dimitro Denčev tenoro
Snježana Barova akompanantino

BOA 10972
STEREO
BALKANTON

turitecon de sia voĉo kun teknika lerteco — facila spirado en la laŭta registro, la inteligentan prezenton de la muzika frazo kun la tiel necesa sento pri mezuro kaj stilo. La stabileco, atingita de Maria Angelova, permesas al ŝi facile konstrui la muzikan linion ĉe arioj aparte malfacilaj por plenumado, same kiel ĉe la kantoj de diversaj aŭtoroj el diversaj epokoj. Ĉiujn verkojn en sia ampleksa kaj varia repertuaro (Pergolesi, Mozart, Schubert, Raĥmaninov, Bellini, Ljubomir Pipkov, Dobri Ĥristov, kaj ankaŭ kantojn el la bulgara folkloro) la kantistino proponas en sia ĝusta kaj eleganta interpreto.

Belan voĉon posedas la tenoro Dimitar Denčev, kies plenumoj ege memorigas pri la tradicioj de la itala „belkanto“. La kantisto posedas la bazajn postulojn de tiu malfacila arto. En la meza registro lia voĉo estas stabila kaj la spirebleco — bona, kaj ĉi tie plej bone vidigas la kvalitojn kaj specifeco de lia lirike sonanta voĉo. Dimitar Denčev prezentas variajn muzikajn verkojn el sia repertuaro, inter ili ankaŭ la dueton de Amina kaj Elvino el la opero „Somnambulo“ de Bellini, kiun li plenumas kune kun Maria Angelova.

Per sia nova gramofondisko la du bulgaraj esperantistoj ne nur kontribuas por pliriĉigo de la bulgara muzika kulturo, sed ankaŭ por sukcesa evoluo de la E-movado en la mondo.

R. D.

„DU BULGAROJ KANTAS EN ESPERANTO“ — „BALKANTON“ — STEREO — BOA 10972

KANTAS MIŜO ZDRAVEV

Al la esperantistoj en Bulgario kaj en alilando jam delonge estas konata la nomo de la aktoro, kantisto kaj recitanto Miŝo Zdravev. Sur la scenejoj de naciaj kaj UEA-kongresoj li plenumis riĉenhavajn programojn, parto el kiuj estas registritaj sur gramofondiskoj.

Antaŭ nelonge Miŝo Zdravev ĝojigis nin per sia nova gramofondisko. Li plenumis du agrablajn kaj facilajn kantojn: „Venu en Borovec“ kaj „Gojo“, kies tekstojn en Esperanto verkis li mem. La plenumo de Miŝo Zdravev karakteriziĝas per natura kaj spontana ligo kun la publiko kaj per facileco de la melodioj, kiujn la publiko povas ekkanti tuj. Lia agrabla voĉo, kun mola tembro estas lirike kolorita, kaj la klara prononcado estas plua pozitiva elemento de lia plenumo.

La gramofondiskoj de Miŝo Zdravev estas tre serĉataj. Ili estas bonega donaco por alilandaj amikoj-esperantistoj.

RADOSLAV DOJČINOV



„BALKANTON“ — STEREO — BTK — 3695

KANTAS MIŜO ZDRAVEV

„VENU EN BOROVEC“ (Ĥristo Kovaĉev, Ignat Ignatov, Miŝo Vaklinov)

„GOJO“ (Ĥristo Kovaĉev, Georgi Bakalov, Dimitar Simeonov)

Akompanas: Orkestro „Sofia“, direktanto Dimitar Simeonov

IMITINDA INICIATO

„Pablo Neruda estas sendube unu el la hispanlingvaj poetoj, kiuj plej vaste kaj profunde influis sur la evoluo de la hispana kaj Latinamerika poezio. Li estis la nuntempa hispanlingva poeto, kies verkoj estas plej ofte tradukataj en diversajn lingvojn. Kaj se tiuj ŝajnas ne sufiĉaj meritoj, oni ne devas forgesi, ke li gajnis ankaŭ la Nobel-premion pri Poesio. . . .

P. Neruda estas tute libera en sia esprimformo kaj foje liaj versoj rompiĝas ritme kaj rime. . . Pro tio ne ŝajnas al mi tro facila laboro traduki lian libron kaj samtempe konservi ĝian valoron.“

Per tiuj vortoj komenciĝas la antaŭparolo de la poemkolekto „**Dudek ampoemoj kaj unu malespera kanto**“, kiun antaŭ nelonge sendis al la redakcio de „BE“ ties tradukinto-José F. Arroyo, estrarano de ILEF. Lia iniciato traduki verkojn de P. Neruda vere estas laŭdinda, ĉar ĝis nun versaĵoj de tiu ĉilia poeto ne aperis en Esperanto.

La libro estas dulingva: sur la maldekstraj paĝoj hispana originalo, kaj sur la dekstraj — la traduko. Ĉar mi posedas hispanan, legante la poemaron mi havis eblecon kompari la Etradukaĵon kaj la originalon. La esperantigitaj versaĵoj de P. Neruda sonas preskaŭ tiel bele, kiel en la hispana. Kvankam sinjoro Arroyo estas medicinisto, li prezentas sin kiel talenta poeto kaj tradukisto. Konsiderante, ke la libron tradukis neprofesia poeto, oni povas pritaksi ĝin relative bonnivela.

La plej grava fakto estas, ke sinjoro José F. Arroyo proprakoste eldonis la poemlibron. Li estas ankaŭ aŭtoro de la arta aranĝo de la kovrilpaĝo, kio denove montras lian multflanke talentitan personecon.

Ni esperu, ke la iniciaton traduki verkojn de Pablo Neruda sekvos baldaŭ aliaj E-poetoj.

VENETA BALEVA

„VESELIN DAMJANOV KANTIS EN SABADELL“

Sub tiu ĉi titolo en n-ro 166 de bulteno „Sabadell Esperantista“ (Hispanio) oni publikigis unupaĝan materialon pri la koncerto de nia baritono V. Damjanov en Sabadell. La aŭtoro karakterizas la prezentadon de nia kantartisto jene:

„Senhezite ni povas aserti, ke la recitalo de la eminenta bulgara baritono ĉe ni estis unu el tiuj aranĝoj, kiuj komplete kontentigis nin, ĉar ĝi superis ĉiujn antaŭvidojn kaj rememori ĝin estas agrabla plezuro“. . .

„La publiko frandis la varian diverslingvan repertuaron ankaŭ en la Internacia Lingvo kaj premiis la artiston per longaj kaj sinceraj aplaŭdoj.“

E. G.

SUKCESA PACAKTIVECO

En la ĉapitro „Eksteraj rilatoj“ de la Raporto de Estraro de UEA pri la UEA-agado dum 1982, publikita en n-ro 5/1983 de revuo „Esperanto“, oni menciis pri la prezento de la 103 000 subskriboj por malarmado al UN. Ilin kolektis bulgaraj esperantistoj responde al la Alvoko de Bulgara Esperantista Asocio kaj Bulgara MEM-Komitato. Lige kun tio oni skribis:

„Kune kun la bulgara asocio pri UN en julio UEA transdonis petskribon pri malarmado al la Vica Ĝenerala Sekretario pri malarmado, s-ro Maertenson. Temis pri centmilo da subskriboj, kolektitaj en Bulgario laŭ teksto disvastigita de Kvakera Esperanto-Societo. Partoprenante la ceremonion, la reprezentanto de UEA, prof. Tonkin emfazis la politikan neŭtralecon de UEA kaj la taŭgecon de Esperanto por efika kunlaborado de la homoj je internacia skalo“.

En la sama numero sur la sekva paĝo estas publikigita foto de la ceremonio lige kun la prezento de la subskriboj.

D. ĤAĜIEV

AMPLEKSA ENHAVO

La 14-an de junio k. j. **Radio Zagreb** en sia esperantlingva programo elsendis pri „BE“ jenon:

„Bulgara Esperantisto — grandformata revuo de Bulgara Esperantista Asocio, aperigis siajn unuajn tri numerojn por la nuna jaro. La kovrililoj estas kolorpajperaj, ornamitaj per nigra-blanka foto aŭ desegnaĵo. En ĉiu kajero aperas literatura kaj prilingva paĝoj. En la januara numero per tradukita teksto kaj desegno-portreto estas prezentitaj la bulgaraj verkistoj Ĥristo Botev kaj Aleko Konstantinov. En la prilingva rubriko Simeon Hesapĉiev donas konsilojn pri skribado de bulgaraj nomoj en Esperanto. En tiu kajero sur preskaŭ du paĝoj aperis kalendaro de internaciaj kaj bulgaraj aranĝoj dum 1983.

Enkonduko de la februara kajero estas parto de la parolado de prof. Humphrey Tonkin pri generaciaj aspektoj en la Esperantaj rondoj. Sur la literatura paĝo aperis intervjuo kun la ĉeĥa poetino Eli Urbánová, ilustrita per ŝia foto-portreto kaj la poemo „Barokaro“. La prilingva paĝo tuŝas Esperantan stilon.

En la marta numero, rozkolora, enkondukan materialon disponigis la aktorino Belka Beleva, prezidantino de Virina Komisiono ĉe BEA. En tiu kajero aperis pluraj poeziaĵoj de poetoj. La 100-jaran datrevenon post la morto de Karl Marx, per artikolo memorigas Veneta Baleva. Sub rubriko „Ni recenzas“ aperis longa materialo de Asen Grigorov pri la nova Bulgara-Esperanta Vortaro de Violin Oljanov, kiun la recenzinto konsideras „necesa konsultlibro“, sendepende de kelkaj eraroj, mankoj kaj malĝustaĵoj, kiujn li listigas“.

EMILIA LAPENNA

Sur la unua kovrilpaĝo:

„Septembro '23“ — grafikaĵo de Angel Angelov

STARA ZAGORA — SEP NOMOJ, SEP EPOKOJ...

Estas en nia lando urbo travivinta jarcentojn kaj restinta senmorta kaj fiera — vivanta simbolo de la kredo al la rezistopovo de la bulgara gento.

Tiu ĉi urbo estas Stara Zagora. Urbo kun sep nomoj, kun sepmiljara historio. Se ni pense enrigardus en ĝin, ni devus komenci nian promenon de la traca loĝloko Beroe, pasi sub la triumfarko de la rekonstruita fare de la romianoj urbo Aŭgusta Trajana, viziti la malnovan Vereja, la mezepokan bulgaran Borujgrad kaj la sklavigitan de la otomanaj turkoj Eski Zagra, ekiri laŭ la mallargaj ŝtonpavimitaj stratetoj de la renesanca Jeleznik, por atingi la nuntempan sunplenan Stara Zagora. Kaj ni nepre konvinkigus, ke tio ne estas simpla ŝanĝo de la nomoj de loĝloko, sed penigaj zigzagoj de plurfoja renoviĝo, de evoluo laŭ supreniranta spiralo...

Krucvojo de migrantaj popoloj, Stara Zagora multfoje estis ruinigata per glavo kaj fajro, tamen denove rekonstruata kaj plibeligata, ĉiam pli majeste kaj impone aspektanta...

Urbo de artoj, de poetoj kaj de kreantoj de estetikaj valoroj — tia estas nuntempa Stara Zagora. En tiu urbo naskiĝis kaj verkis la poetoj Geo Milev kaj Kiril Hristov, la verkisto Georgi Rajčev, la kritikisto Georgi Bakalov. En la unua provinca opereatro en Stara Zagora sonis la najtingala voĉo de la eminenta bulgara kantistino Hristina Morfova. En tiu ĉi urbo disfloris la arto de plejado da talentaj pentristoj.

Stara Zagora — urbo de popolaj herooj — zorgeme konservas la memoron pri la apostolo de la libero Vasil Levski, pri la epikaj bataloj de la risaj kaj bulgaraj bravuloj por liberigo de la urbo elsub otomana jugo en julio 1877 kaj pri ilia semorta heroaĵo por savo de la sankta batalstandardo de Samara. Stara Za-

gora estas enskribinta en la panteonon de senmortuloj la nomojn de siaj plej dignaj gefiloj, fordonintaj siajn junecon kaj vivon en la kruela batalo kontraŭ kapitalismo kaj monarkofaŝismo en la sanga 1923 kaj dum la periodo 1941—1944. Multnombraj estas la viktimoj kaj la pereintoj en tiuj sangoverŝaj bataloj, sed ili ĉiuj — komunistoj, komsomolanoj, agraranoj kaj senpartiaj patriotoj, ne ŝparis siajn fortojn, profunde kredante pri la baldaŭa venko. Partizanoj, politikaj malliberuloj kaj iliaj helpantoj — ili ĉiuj per siaj heroaĵoj preparis la alvenon de la nova vivo en la antikvan urbon.

Hodiaŭ Stara Zagora estas granda moderna distrikta centro, kun multaj entreprenoj de la energetika kaj kemia industrio; centro de klerigo kaj kulturo — en ĝi estas multaj elementaj kaj mezaj lernejoj, superaj institutoj de veterinara medicino kaj por instruistinoj en infanvartejoj, sciencesploraj institutoj, opera, dram- kaj pupteatroj, radioelsenda stacio, multaj muzeoj, bibliotekoj, artgalerio, societoj de ĵurnalistoj, verkistoj kaj pentristoj, simfonia orkestro... Nuntempa Stara Zagora zorgeme evoluigas la kulturajn tradiciojn de la antaŭuloj, kontribuas por pliriĝo de la nacia kulturo, konservante la profundan estimon kaj admiron de la loĝantaro kaj speciale de la juna generacio al la memoro kaj la heroaĵo de tiuj, kiuj pereis por la feliĉa nuntempo de socialisma Stara Zagora.

Stara Zagora — urbo kun sep nomoj, travivinta sep epokojn — elkreskas ĉiam pli kaj pli bela, enkorpiginte en la vivon la valorojn kaj la tradiciojn de la pasintaj jarcentoj, evoluas kiel moderna, floranta socialisma urbo.

STOJAN STAEV

Ĉefredaktoro: Dončo HĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI, prof. Vasil COĈOV, Dimităr ĤAĤIEV, Krăstju KARUCIN

Administranto: Asen Josifov

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodjo“ — 1 grado, Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66

1 000 Sofio